

# EL POPOLA ĈINIO

中國報道


12 1983






# *La Kvina Tutlanda Sportkunveno de Ĉinio*

Fotoj de LAO BAI




La inaŭguro

Kolektiva gimnastiko








Arta parašutado



Draka danco







Altosaltisto Zhu Jianhua rompis sian mondan rekordon per 2.38 metroj.


Foto de GAO MINGYI



Li Ning, ĉampiono de la vira kunmetita gimnastika konkurso

Wu Jiani, ĉampiono de la virina kunmetita gimnastika konkurso






级别 **56** 第 **2** 次 **128** 公斤 **0:39** 世界纪录 **127.5**

单位	姓名	体重	抓				举		
			1	2	3	4	1	2	3
北京	徐国良	55.6	65						
广东	张林州	55.75	110	135	145			5	
广西	粟景阳	55.55	105	130	140			9	
江西	万喜生	55.5	105	130	142.5			9	
广西	吴敦德	55.7	120	148					
上海	王银法	55.75	107.5	132.5	142.5			7	
解放军	赖润明	55.8	115	142.5	155				
浙江	钱军	55.65	100	130	142.5				
上海	韩震宇	55.7	100	135	145				
下									
广东	林常青	55.65							
湖南	沙联政	54.95						6	
天津	殷利华	55.65							
天津	徐志杰	55.55							
山西	黄子明	56							
广东	王国锋	55.6							
解放军	王浩学	55.6							
广东	叶焕明	54.65						5	18

重成绩记分牌

海体育器材

Halterlevisto Wu Shude per 128 kilogramoj rompis la mondan rekordon de dumana ŝirlevo de haltero je 56-kilogramma pezkategorio. Foto de LIU YI









Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

**SUR LA KOVRILO:**

En 110-metra vira barierkuro

Foto de **LAO BAI**

**SUR LA DORSKOVRILO:**

La Granda Muro

Fotoj de **YAN JIN, LAO BAI kaj RU SUICHU**

**KOLORAJ SERIOJ:**

La Kvina Tutlanda Sportkunveno de Ĉinio

Pejzaĝoj ĉe Hengshan-monto

Fotoj faritaj de esp-istoj

Vojaĝo laŭ Songhua-rivero (3)

Antikvaj restaĵoj en Songshan

**NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:**

Konduko de akvo de Luanhe al Tianjin

Gaja renkontiĝo

Gastado en Jugoslavio

## Enhavo

Rememoro pri Esp-movado en Yan'an . . . . .	2
Gastado en Jugoslavio . . . . .	5
Finfine en Ĉinio! . . . . .	7
Internacia geedziĝo por la Internacia Lingvo . . . . .	8
POR KOMENCANTOJ: Amo de infano . . . . .	10
ESP-NOVAĴOJ . . . . .	25
Ĉina sporto marŝanta al nova celo . . . . .	11
Lulilo de atletiko . . . . .	14
Dolĉa akvo fluas al Tianjin . . . . .	16
Pri la silkindustrio de Zhejiang . . . . .	19
Vojaĝo laŭ Songhua-rivero (3): De Jiamusi al Tongjiang . . . . .	46
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	27
En senfina esplorado . . . . .	29
La ĉina hidroterapio . . . . .	30
Kvindek du fotoj (novelo) . . . . .	33
MIA VIVO: Oferado . . . . .	36
VIDINDAJ LOKOJ: Hengshan-monto . . . . .	23
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Vojaĝo al Songshan-monto . . . . .	38
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: La sistemo de ĉinaj mezuriloj . . . . .	41
5 000 JAROJ DE ĈINIO: La prospera ekonomio de Tang-dinastio . . . . .	43
INTER NI: Opinioj de niaj legantoj . . . . .	31
KORESPONDI DEZIRAS . . . . .	18, 42

JARABONTARIFO		FR Germanio	DM	14.00	Italio	Lit	6000.00	Portugaliao	Esc.	500.00				
Aŭstralio	\$A	7.00	Britio	£	4.00	Japanio	Yen	1400.00	Svisio	SF	12.00			
Aŭstrio	Sch	100.00	Finnlando	FMK	30.00	Jugoslavio	Din.	200.00	Usono	US\$	6.00			
Belgio	BF	230.00	Francio	FF	40.00	Nederlando	Gld.	16.00	Kanado	Can\$	7.50			
			Hispanio	Pts	700.00	Nov-Zelando	NZ\$	8.00						
Por aliaj landoj en Eŭropo:			£	4.00	US\$	6.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				£	2.80	US\$	4.00





Prezidanto Maŭ Zedong en kavernodomo de Yan-an, 1946

WANG ZHONGFANG:

## Rememoro pri Esp-movado en Yan'an

— Okaze de la 90-a datreveno de la naskiĝo de Maŭ Zedong

*Maŭ Zedong donis grandan subtenon al Esperanto. Sub lia zorgado la Esperanto-movado de la ĉina revolucia bazloko Yan'an tre viglis en la 30-aj kaj 40-aj jaroj. La 26-a de decembro ĉi-jare estas la 90-a datreveno de lia naskiĝo. Por memorigi pri li, ni petis Wang Zhongfang, vicprezidanton de la Konstanta Komitato de la Ĉina Juroscienca Asocio kaj membron de "Amikoj de Esperanto", verki jenan artikolon.*

— La Red.

En Ĉinio Esperanto koniĝis unue en urboj kaj kune kun progressa kultura movado disvastiĝis iom post iom inter junaj intelektuloj. Post kiam japanaj imperiistoj faris agresan militon kon-

traŭ Ĉinio en julio de 1937, granda nombro da urbaj intelektuloj venis al la revolucia sankta loko Yan'an en la altebenajo de norda Shaanxi-provinco. Tiel Esperanto disvastiĝis, floris

kaj fruktis en Yan'an, poste en aliaj lokoj de la lando.

Atinginte Yan'an, miloj kaj dekmiloj da junuloj studis la revolucion veron pri rezistado



kontraŭ Japanio kaj savado de la nacio en la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato, la Popola Kolegio de Norda Shaanxi, la Lusin-a Arta Kolegio k. a., kiujn fondis la Komunista Partio de Ĉinio. Post mallonga studado ili iris al la kontraŭjapana fronto. Inter ili estis esperantistoj, kiuj diskonigis Esperanton en murgazetoj kaj skribis kontraŭjapanajn sloganojn en Esperanto.

La Esperanto-movado de Yan'an komenciĝis en 1939. Tiam s-ano Zhuang Dong, veninta el regiono regata de Kuomintang, loĝis en la Kultura Asocio de la Shaanxi-Gansu-Ningxia-a Limregiono. Sub la subteno de la asocio li memvole kolektis disajn esperantistojn kaj fondis la Yan'an-an Esperantistan Ligon. Li kaj Huang Nai, Chen Shi kaj mi fariĝis ĝiaj konsilantoj.


La Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Maŭ Zedong donis grandan atenton al la Esperanta laboro, esperante, ke ni servigos Esperanton al la internaciismo kaj revolucio. Maŭ Zedong skribis por ni Yan'an-aj esperantistoj: "Mi dirus ankoraŭ la samon: Se oni prenas Esperanton kiel formon por porti la ideon vere internacisman kaj la ideon vere revolucionan, do Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata." Tiu skribaĵo montris direktan por la ĉina Esperanto-movado. Poste la skribaĵo disvastiĝis en Yan'an kaj nia ligo ricevis grandan subtenon de la lokaj partiaj kaj registaraj institucioj. En la komenco de 1940 la kultura rondo de la Shaanxi-Gansu-Ningxia-a Limregiono okazigis sian unuan kongreson. Ĝin laŭinvite ĉeestis tri konsilantoj de nia ligo. Maŭ Zedong intime in-

tervidiĝis kun la kongresanoj kaj faris raporton sub la titolo "Pri Novdemokratio", kio ege inspiris ĉinajn kulturajn laborantojn, inkluzive de esperantistoj.

Nia ligo aktivis en malfacilaj cirkonstancoj. Ĝi funkciigis Esperanto-ekspozicion en la Junula Klubo ĉe Wenhuagou, la kultura centro en Yan'an. La ekspozicio eksponis Esperantajn tradukojn de verkoj de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin, kiaj «La Komunista Manifesto», «Fundamentoj de Leninismo» kaj «Marks, Engels, Lenin kaj Stalin pri Literaturo kaj Arto», kaj ankaŭ montris Esperantajn gazetojn, ekzemple la hispana gazeto «Popola Fronto» informanta pri la hispana interna milito, la ĉinan Esperantan periodaĵon Heroldo de Ĉinio propa-

gandantan la revolucion de Ĉinio kaj la mondo, kaj Esperantajn lernolibrojn, vortarojn kaj kantfoliojn eldonitajn de Ĉinio. La ekspozicion vizitis multaj revoluciaj kadroj kaj batalantoj, kiuj antaŭe ne aŭdis pri Esperanto. Post sia vizito ili ekkomprenis, ke Esperanto estas ne nur artefarita lingvo scienca kaj facile lernebla, sed ankaŭ tre bona propagandilo por Marksismo-Leninismo. Nemalmultaj notis sian impreson en vizitlibro kaj esprimis fortan deziron lerni nian lingvon.

Post la ekspozicio nia ligo fondis du Esperanto-kursojn elementan kaj mezgradan, al kiuj multaj sin anoncis. La kursoj funkciis ĉiun dimanĉon. La elementan kurson gvidis Zhuang Dong kaj la mezgradan Huang



Aŭtografo de prezidento Maŭ Zedong pri Esperanto





*En 1939 prezidanto Maŭ kore interparolis kun kamparanoj de Yangjialing.*

Nai. Ĉar la institucioj de Yan'an dislokiĝis en valoj, ili estis malproksime unu de alia, kaj krome la trafiko malfacila, tial ankaŭ la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato kaj la Lusin-a Arta Kolegio fondis Esperanto-kurson. La ĉefaj lernolibroj de la kursanoj estis kompilitaj kaj mimeografitaj de nia ligo. Tiam oni havis kelkajn ekzemplerojn de «Vortaro Esperanta-Ĉina» alportitajn el regiono regata de Kuomintango, kiujn la kursanoj rigardis kiel valorajn kaj konkure legis kaj transskribis. Krom doni lecionojn, oni ankaŭ instruis kantojn. Multaj kursanoj ellernis Esperantajn kantojn, kiujn ili ankoraŭ bone memoris post multaj jaroj, kvankam ili iom forgesis la lingvon mem. Nun mi ankoraŭ povas bone

kanti la hungaran kanton «Tra la Stratoj» en Esperanto. Iuj el la kursanoj bone ellernis la anglan aŭ rusan lingvon dank' al Esperanto.

Nia ligo eldonis sian gazeton «Jan'an-a Esperantisto». En la komenco la gazeto estis mimeografita de nia ligo. Poste laboristoj de la presejo de la Oka-voja Armeo lernis nian lingvon, ili iniciative donis helpon por stereotipi la gazeton kaj eldoni Esperantajn lernolibrojn. La gazeto, komence ĉin-lingva kaj poste Esperanta, estis sendita ne nur al la kontraŭjapana fronto kaj postfronto, sed ankaŭ al aliaj landoj tra Chongqing kaj Hongkong. Ĝi rompis la kuomintangan novaj-blokadon por konigi al siaj legantoj en kaj ekster la lando la ĝustajn vidpunktojn de

la Komunista Partio de Ĉinio, la venkojn de la Oka-voja Armeo kaj Nova Kvara Armeo kaj la realan staton de kontraŭjapanaj bazlokoj. La gazeto ankaŭ ĝustatempe publikigis la Esperantan tradukon de fama artikolo de Maŭ Zedong «Memore al Norman Bethune» por laŭdi la internaciisman spiriton de la kanada kuracisto Norman Bethune, kiu vekis grandan admiron de en-kaj eksterlandaj legantoj.

Dum la unuaj tri jaroj de la Kontraŭjapana Rezistmilito nia ligo, sub la zorgado de Maŭ Zedong, uzis Esperanton en la batalo por la nacia sendependiĝo kaj liberiĝo, vigle laboris kaj akiris grandajn sukcesojn. Hodiaŭ kiam mi rememoras tion, mi sentas ankoraŭ grandan ĝojon, kiel antaŭe.

# Gastado en Jugoslavio

**P**OST la fermiĝo de la 68-a UK, de 12-a ĝis 31-a de aŭgusto, kvar membroj de la Ĉina Esperanto-Delegacio estrata de Zhang Qicheng, la ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, faris amikan viziton en Jugoslavio, invitite de la Jugoslavia Esperanto-Ligo kaj la Kroatia Esperanto-Ligo. Tie ni pririgardis la "Ekspozicion de Ĉinaj Esperanto-eldonaĵoj" okazigitan en Zagrebo, ĉefurbo de Kroatio kaj vizitis la urbojn Beogrado, Sibenik, Rijeka kaj Pula kaj renkontiĝis kun esperantistoj-amikoj. La tempo rapide forpasis, sed la amikeco de jugoslavaj esperantistoj profunde gravuriĝis en nia memoro.

## EKSPOZICIO DE ĈINAJ ESPERANTO-ELDONAĴOJ

En 1978 Jugoslavio organizis "Tagojn de Ĉina Kulturo", sed ekskluziva ekspono de ĉinaj Esperanto-eldonaĵoj neniam okazis. La ekspozicio estis okazigita de la Kroatia E-Ligo sub la aŭspicio de la Jugoslavia E-Ligo. Ĉinio liveris al ĝi la ĉefajn eksponaĵojn, inkluzive de libroj, albumoj, infanlegaĵoj, periodaĵoj kaj poŝtkartoj. La ekspozicio estis ne granda, sed bone propagandita de jugoslavaj kamaradoj. Du tagojn antaŭ ĝia inaŭguro, t. e. 16-an de aŭgusto, la loka ĵurnalo de Zagrebo jam informis pri la vizito de la Ĉina Esperanto-Delegacio al Jugoslavio kaj la baldaŭ okazonta Eks-

pozicio de Ĉinaj Esperanto-eldonaĵoj. La ekspono havis lokon en la Juneca Librejo proksime de la Respublika Placo en la urbocentro. Sub la okulfrapa titolo "Ekspozicio de Ĉinaj Esperanto-eldonaĵoj" estis skribitaj la vortoj de prezidanto Tito kaj prezidanto Maŭ Zedong pri Esperanto.

Aŭgusto estas feria monato por jugoslavaj laboruloj. Ekster nia atendo, tiel multaj kamaradoj ĉeestis la inaŭguron. La organizantoj devis aldoni du vicojn da seĝoj en la trapasejo, kaj eĉ tiom da seĝoj ne sufiĉis kaj multaj partoprenantoj devis stari malantaŭe de la kunveno kaj ambaŭflanke de la podio.

La inaŭguron prezidis Ante Ferencic, eksprezidanto de la Kroatia E-Ligo, ĉar la nuna prezidanto Nikola Segota ne ĉeestis pro malsano. En la ceremonio d-ro Dalibor Brozoriĉ, profesoro de la Jugoslava Scienca Akademio, kaj Zhang Qicheng, estro de la Ĉina E-Delegacio, faris paroladojn. Ni kaj jugoslavaj kamaradoj deklamis per la lingvoj ĉina, kroatia kaj Esperanto tri poemojn de la granda ĉina poeto Li Bai, kiu vivis en la oka jarcento. Junaj esperantistoj prezentis solon kaj ludis muzikaĵojn.

Post la ceremonio multaj ĉeestantoj ĉirkaŭis nin antaŭ la podio, iuj donacis al ni memoraĵojn, aliaj manpremis nin kaj


triaj petis nin subskribi. Ankaŭ iuj neesperantistoj sin turnis al ni por Esperantaĵoj. Krome plura esperantistoj petis nin rekomendi al ili korespondajn amikojn. La grandaĝa esperantisto Franjo Vokoun montris al ni leteron kaj foton, kiujn sendis la ĉina veterana esperantisto Xu Shanshu en 1957, por informiĝi pri Xu, kun kiu li perdis korespondan rilaton antaŭ 27 jaroj. Kiam li sciis ke Xu Shanshu nun estras la redakcion de EPC, li tre ĝojis kaj petis nin transdiri lian saluton al Xu. Li ĉiam sopiras al tiu ĉina amiko kaj deziras rekomenci korespondon kun li. La maljunulo longe manpremis nin montrante emociiĝon kaj grandan sincerecon.

Ankaŭ raportistoj de la loka ĵurnalo kaj televid-stacio ĉeestis la inaŭguron. Je la 10-a horo nokte la televida novaĵ-programo dissendis la inaŭguron de la ekspozicio. En la sekvanta mateno oni ripetis la programon.

## NE NUR GASTOJ SED ANKAŬ INTIMULOJ

Depost la vizito de prezidanto Tito al Ĉinio en 1977, precipe depost la vizito de la ĝenerala sekretario de KPC Hu Yaobang al Jugoslavio en majo de la kuranta jaro, la rilato inter Ĉinio kaj Jugoslavio havis novan disvolviĝon. Ĉi-foje nia delegacio estis rigardata kiel amika sendito de la ĉina popolo kaj ricevis varman akcepton. Dum nia res-





*Membroj de la Ĉina Esperanto-delegacio kun gvidanto (la tria de maldekstre) de la Politika Lernejo de Jugoslavio*

tado en Jugoslavio, raportistoj de kvin radiostacioj intervjuis nin, ok-foje raportis pri nia delegacio. La ĵurnaloj de Zagrebo, Lijeka kaj Pula kvin-foje raportis pri niaj aktivadoj. La ĵurnalo en Zagrebo faris specialan konigon pri la delegaciestro Zhang Qicheng kaj EPC.

Nia delegacio ricevis aŭdiencojn ĉe Drago Putnikovic, la urbestro de Sibenik, Slavko Bjazic, la respondeculo de la Juneca Insulo, kaj Ivan Puškar, la prezidanto de la Sindikata Federacio de la Kroatia Respubliko. Kiam ni vizitis la Kroatian Loterian Kompanion, petrolkemiajn entreprenojn INA kaj DINA, ŝipfabrikon de la 3-a de Majo, Uljanik-ŝipfabrikon kaj ĵurnalan redakcion, ĉie nin akceptis altrangaj personoj kiel direktoro, vicdirektoro kaj ĉefredaktoro. Unu tagon antaŭ nia refugo al Ĉinio Stefa Speljak, la edzino de la prezidanto de la Socialisma Federacia Respubliko de Jugoslavio kaj prezidanto de la Socialisma Laborula Kunordiga Komisiono de Kroatia Respu-

bliko, donis al ni aŭdiencon, kaj Ljuban Tintor, respondeculo de la Komisiono de Eksterlandaj Aferoj de tiu organizo, tagmanĝis kune kun ni.

La intervidiĝo de ambaŭlandaj esperantistoj pli intimigis iliajn rilatojn. Sinjorino Cvetanka Tubic, kiu vizitis nian landon antaŭ tri jaroj, persiste petis nin gastigi en ŝia hejmo en Sid, kiam ŝi eksciis en UK en Hungario pri nia baldaŭa vizito al Jugoslavio. Ni ne povis rifuzi ŝian afablan inviton kaj vizitis ŝian hejmlokon. Tie ŝiaj gepatroj varme akceptis nin kiel siajn familianojn. Kiam ni vizitis Zagrebon, ni loĝis en hejmoj de esperantistoj, escepte de la 71-jara delegaciestro Zhang Qicheng, kiu loĝis en hotelo. Tio donis al ni ŝancon vivi inter jugoslavaj amikoj tage kaj nokte. Por pli bone nin zorgi la Kroatia Esperanto-Ligo sendis Spomenka Stimec kaj Ivica Špoljarec por nin akompani. En Beogrado kaj Pula ni ĉiam estis akompanataj de Stevo M. Radenovic kaj Ivo Borovečki respektive. La jugoslavaj amikoj

akceptis nin kiel honorindajn gastojn kaj karajn proksimulojn. Kaj ni vivis en tre granda amikeco kaj harmonio.

La gastigantoj aranĝis por ni diversajn interesajn vizitojn. Krom partopreni en Esperantaj aktivadoj, ni vizitis modernajn fabrikojn, gastis en diverstipaj familioj kaj ĝuis ĉarmajn pejzaĝojn de vidindaĵoj kaj tiel ni multe konis la morojn kaj kutimojn de jugoslava popolo.

Ĉi tie ni devas aparte menciigi pri la vizito al la tombejo de Tito, al la muzeo "25-a de Majo", nomita per la dato de naskiĝtago de Tito, kaj al lia malnova loĝejo. Tio donis al ni pli konkretajn sciojn pri liaj vivo kaj laboro kaj pliprofundigis nian respekton al li. La gastigantoj speciale aranĝis por ni viziton al la Insulo Brioni. La insulo estas tre ĉarma, kvietaj kaj pitoreska, kaj tie Tito donis aŭdiencon al fremdlandaj ŝtatestroj. Sur la insulo estas muzeo, kie kreskas diversaj raraj floroj kaj herboj kaj brediĝas kuriozaj birdoj kaj bestoj, kiujn donacis aliaj landoj al Tito. Estis granda feliĉo por ni, ke ni havis la honoron viziti la insulon.

### **SINCERA AMIKECO KAJ INTIMA KUNLABORO**

Dank' al la kontaktiĝo kun jugoslavaj esperantistoj ni pli multe informiĝis pri la jugoslava Esperanto-movado. Ili faris tre bonajn disvastigadon kaj instruadon de Esperanto. Lokaj Esperanto-organizoj ĝenerale havas multajn membrojn, kiuj atingis sufiĉe altan lingvan nivelon. Ili troviĝas en tre diversaj lokoj kaj profesioj. La jugoslavaj esperantistoj faris multajn klopodojn por amikeco inter la ĉina kaj jugoslava popo-

loj kaj sindone laboras por la Esperanta afero. Ilia spirito estas lerninda por ni. Ambaŭlandaj esperantistoj interŝanĝis opiniojn pri plifortigo de amikaj kontaktoj, kunlaboro por traduko kaj eldono kaj reciproka subteno okaze de la 71-a UK en Ĉinio.

Ni speciale veturis al la hejmo de nia malnova amiko Marinko Gjivoje, forpasinta peranto de EPC, kaj vizitis liajn familianojn. Eĉ en grava kormalsano, li ne interrompis la peradon. Antaŭ sia morto li rekomendis al ni novan peranton, por ke lia multjara distribuado ne interrompiĝu. Li estis laŭdinda amiko, kiu multe kontribuis en disvastigo de Esperanto kaj plifortigo de la amikeco inter la ĉina kaj jugoslava popoloj.

Ni vizitis ankaŭ aliajn jugoslavajn perantojn por esprimi al ili koran dankon. Multaj el niaj perantoj havas sian propran profesion kaj faras peradon post laboro kaj en ferioj. Niaj jugoslavaj perantoj ĉiuj estas fervoraj en sia distribuado kaj tre sincere raj al Ĉinio. Nia peranto Tomo Plâkovic en Pula eĉ mem mendis nian revuon por donaci ĝin al aliaj. Informiĝinte pri nia alveno al Beogrado, la peranto Milorad Djurdjevic kaj lia edzino veturis de Smederevo 40 kilometrojn fora por nin viziti kaj inviti nin gasti ĉe ili. Sed bedaŭrinde, la tempo ne permesis al ni tion fari. Antaŭ nia reflugo al Ĉinio, ili refoje veturis al Beogrado por nin adiaŭi.

Tri semajnoj rapide forpasis. Kaj ni ne povis ne fari bedaŭran adiaŭon al la jugoslavaj amikoj. Ni sincere dankas ilin por ilia afableco kaj gastamo. Ni esperas, ke ni revidos la jugoslavajn amikojn en baldaŭa estonteco.

LUSI HARMON:

## FINFINE EN ĈINIO!

**P**OST dek jaroj da atendado venis la okazo.

Kial post dek jaroj? Dum la 60a Japana Esperanto-Kongreso en Kameoka en aŭgusto de 1973, mi unufoje havis la plezuron renkonti ĉinajn esperantistojn. Jam tiam mi ekpensis iam viziti Ĉinion.

Sep jarojn poste, mi kaj mia edzo William R. Harmon ĉeestis la Tut-Pacifikan Kongreson en Vankuvero, Kanado en julio 1980. Tie ni renkontis S-rojn Xue, Wang, kaj. . . refoje, Zhu Mingyi, kiu ĝojigis min per informo, ke ĈEL invitis Ges-rojn Schulze, mian edzon kaj min viziti Ĉinion, kun grupo da usonaj geesperantistoj ĝis 16. Sen ia prokrasto, ni ekorganizis tiun grupon, kiu efektiviĝis en 1981. Bedaŭrinde nek Ges-roj Schulze nek mi povis partopreni, sed mia edzo Vilĉjo ĝoje prenis la res-

pondecon por la grupo. Tiu vizito estis jam priskribita kelkfoje en El Popola Ĉinio kaj en aliaj publikajoj, esperantaj kaj anglaj. La grupo revenis kun grandaj laŭdoj pri la gastameco de la ĉinaj gesamideanoj kaj la multaj memorindaj ekskursoj en Ĉinio.

Tamen . . . ankoraŭ ne MI en Ĉinio. En 1981 ĉe la Universala Kongreso en Brazilio mi havis la plezuron renkonti jam konatan S-ron Chen kaj S-rojn Zhang kaj Nan; kaj S-inon Tan. Kaj refoje akriĝis mia deziro viziti Ĉinion. En 1982 ĉe la Universala Kongreso en Antverpeno, mi renkontis pli grandan grupon da ĉinaj gesamideanoj; refoje S-rojn Zhang kaj Zhu, S-ron Chou (kiu bone prelegis) kaj F-inon Qiu, kies kantadon mi tre ĝuis.

Mi estas profesie vojaĝagento; kaj okaze vojaĝinstancoj kaj kompanioj aranĝas specialajn

*ĈEL donas festenon por s-ino Lusi Harmon.*





# Internacia Geedziĝo por la Internacia Lingvo

UNU el la flankaj efikoj de la irana Esperanto-movado, plejlaste, estis internacia geedziĝo esperantista, fruktodona al la Esp-movado.

La 30-an de aprilo 1981, en Heroldo de Esperanto aperis jena anonceto: "Mezaĝa sinjoro serĉas amikino Esperantiston por formi familion. . ."

La anoncinto s-ro Jalĉin el Turkio dum jaroj aktivadis en turismo, intencis edziĝi al esperantistino alilanda.

En Irano, f-ino Heŝmat Faraĝi respondis al la anonceto. Por sia edziniĝo ŝi havis ĉefe tri antaŭkondiĉojn:

1. La edzo devus esti esperantisto;

2. La edzo devus esti esperantisto ne-irana, por ke efektiviĝu la plejbla internacia kunlaborado por la movado;

3. La esperantista edzo ne-irana devus esti aktiva sed ne pasiva esperantisto en la movado.

Finfine, la 8-an de junio 1982, okazis la geedziĝo.

La 31-an de dec. 1982, gesinjoroj Jalĉin vojaĝis al la Hinda Unio kaj Pakistano. Post 26-taga vojaĝo, ili revenis al Irano. S-ino Jalĉin raportis sian vojaĝon en nia kunsido, en la Irana Esperanto-Domo.

"En Nova Delhio ni alvenis en la domon de forpasinta samidea-

no Seoti Prakaŝ, la fondinto de la Hinda Instituto de Esperanto," diris s-ino Jalĉin. "Lia edzino s-ino Eva Prakaŝ, kun du filoj Arun kaj Bobi, gardas la familian tradicion akcepti eksterlandajn esperantistojn. Kvantkam la familio ne tiel flue parolis la lingvon, tamen posedis ĉiujn gravajn novaĵojn rilate al Esperanto en Hindio."

"S-roj Jozef Jijoti kaj B. R. Tulsijani estas spertaj kaj aktivaj personoj. Laŭ hindoj mem, kaj laŭ ni, por plivigli E-on tie, la tuta esperantistaro iel devas helpi ilin per subteno. Espereble, ni povus, per entrepreno de internacia Esperanto-turismo, pli praktike kaj helpeme kunligi nin kun ili."

vojaĝojn kun celo familiarigi iun lokon al la profesiuloj. Subite venis la okazo viziti Ĉinion kun tia grupo. Nu, mi pensis, ke mi preferus viziti Ĉinion kiel esperantisto inter esperantistoj, sed post ĉio, mi ja volas viziti Ĉinion eĉ kiel profesiulo. Mi estas ĉiam esperantisto, negrave por kiu celo mi vizitas! Kaj ankaŭ, ĉar mi estas oficiala vojaĝagento por la instruista sindikato en Kalifornio, kaj mem eksinstruisto, mi jam ekaranĝis ins-

truistan grupon por restadi ĉe universitato en Ĉinio, kaj tie kombini studadon kun ekskursado. Mi decidis, ke mi profitu la viziton por antaŭkontroli taŭgan lokon por tio.

Mi alvenis en Beijing meznokte, kaj estis kortuŝita, sed ne tre surprizita, lerninte pri la gastameco de ĈEL de Vilĉjo, kiam mi vidis ĉe la flughaveno S-rojn Zhu Mingyi kaj Zhang Haiping min atendantajn! Sed la aliaj vojaĝagentoj en la grupo estis ja

surprizitaj, eĉ, mi opinias, iom ĵaluzaj, vidante la akcepton kiun mi ricevis je mia unua alveno en Beijing. Kompreneble mi poste klarigis al ili pri la internacia lingvo Esperanto, kaj kelkaj petis min sendi informon al ili poste. Ni semas kaj semas. . .

La du ĉinaj kamaradoj Zhu kaj Zhang transportis min al la hotelo, kaj kiel bone kaj feliĉe mi sentis min, interparolante kun ili survoje per Esperanto. La etoso estis tuj amikeca, kom-

En Pakistano, ŝi unue vizitis s-ron G. N. Parvaz, la nunan prezidanton de la Pakistana Esperanto-Asocio. Antaŭ la revolucio irana (1979), sinjoro Parvaz laboris en Irano kaj lernis Esperanton ĉe ni. Intertempe, li kelkfoje reiris al Pakistano, kaj starigis kursojn tie. La Esperantaj lerno-materialojn li mem kunportis el Irano. Niasperte, kaj ankaŭ laŭ la loka observado de ges-roj Jalĉin, Prezidanto Parvaz ege sindoneme kaj vere modele aktivis por Esperanto. Dum ĉ. unu jaro, li akiris sukceson, kian multaj, eble dum dek jaroj, ne povus atingi. Li estas ankaŭ ege ŝatata inter siaj samideanoj kaj lernantoj. Ges-oj Jalĉin atestis, kiel esperantistoj en Multano, je la 23-a horo nokte, preparis man-skribaĵojn por multanaj gazetoj naci-lingvaj. Ili alportis la novaĵojn bicikle al la redakcioj, por ĝustatempe ilin publikigi.

La 16-an de jan. 1983, en la Universitato de Multano (en Ŝtata Kolegio pri Edukado), ges-oj Jalĉin prelegis Esperante pri diversaj aspektoj de la Esperanto-movado, antaŭ 50 studentoj kaj profesoroj. La pakistanaj



*La sidantoj (de dekstre): rektoro Ale-Ahmad Aledi, s-ro Jalĉin, s-ino Jalĉin kaj prezidanto Parvaz*

samideanoj tradukis nacilingve la paroladojn. La rektoro profesoro Ale-ahmad Aledi montris sin afabla kaj helpema.

Post 4-taga vizitado kaj interparoloj kun tieaj esperantistoj kaj respondeculoj en Multano, la geedzoj veturis, kune kun alia tre aktiva esperantisto-amiko s-ro Maim, al Ravelpendio, Islamabado kaj Mureo. Ĉie ili vizitis kaj renkontis esperantistojn.

En la monturbo Bansaro Gali, alia pakistana Esperanto-pioniro s-ro Muztar Abbasi, per ĝojplena voĉo, informis ilin, ke oni jam apartigis unu el la nove kons-

truitaj klasĉambroj de la loka religia lernejo speciale por Esperanto. Tage, oni uzas ĝin kiel kancelarion, kaj nokte kiel gastojn por esperantistoj.

Ankaŭ en Pakistano, Esperanto-movado bezonas helpon multflanke.

Kun dankegoj al ĉiuj samideanoj en la Hinda Unio kaj Pakistano, s-ino Jalĉin feliĉe finis sian interesplenan vojaĝo-rakonton. Ŝi rekonfirmis la fakton, ke la Hinda Unio kaj Pakistano, kiel multaj aliaj landoj de la tria mondo, pretas por bonvenigi Esperanton.

forta, kaj mi pensis, ke neniu fremdulo vizitanta Ĉinion uzante sian nacilingvon povus tion same sperti.

La sekvantan tagon amiko Zhu persone gvidis min tra la urbego kaj la Somera Palaco. Kun grupo da lokaj geesperantistoj mi vespere bankedis kaj mi estis feliĉega, babilante pri ĉio kun tiu vigla, interesa grupo. Kia miraklo, mi pensis, senti min tute hejme en tiel ekzotika lando, dekmil kilometrojn for de

mia hejmlando! Jes, la miraklo de neŭtrala, komuna lingvo kiel interkomunikilo.

Restis al mi nur iom pli ol unu tago en Bejing, kaj mi kun mia grupo vizitis la Grandan Muron ĉe Badaling, kaj inspektis kelkajn hotelojn (unu el la devoj de vojaĝanta vojaĝagento!). Poste nia vojplano estis plenplena kaj rapidega, kaj mi eĉ ne havis tempon kontakti aliajn esperantistojn en Ĉinio; certe ne sufiĉe por satigi mian scivolemon

pri tiom da lokoj, tiom da vidindaĵoj. Sed mi povis kapti gusteton de tiu lando, al kiu mi tiom longe sopiris viziti, kaj firmigis la konvinkon, ke mi devos reveni al Ĉinio kiel eble plej baldaŭ, espereble kune kun Vilĉjo, kiu ankaŭ tre volas tion fari, kaj renkonti pli da geesperantistoj, vidi pli da lokoj, pli bone koni tiun grandan, interesvekan landon!

Mi ekpensas pri internacia geesperantista grupo en 1984. . .



# Amo de infano

de WANG YONGZHEN

**A**NTAŬ nelonge, Zhang Haidi (Pri ŝiaj faroj EPĈ jam raportis en la numero 7.) faris televidan paroladon. Tiam mia dekdu-jara filino diris: “Tre bela estas franjo Zhang Haidi.” Aŭdinte tion, mi demandis ŝin: “Pro kio vi opinias ŝin bela?”

“Ŝi havas longan hararon, grandajn okulojn kun okulvitroj, ride-tantan buŝon kaj rondajn vangojn, kiuj ĉiuj estas tre belaj.”

“Ankoraŭ pro kio?”

“Ankoraŭ . . ., ĉar ŝi parolas flue kaj sintenas gracie, kaj krome ŝi kantas bele.”

“Vi diris prave, sed nur parte,” prenante la manon de la filino, mia edzino diris. “Ŝia vera beleco montriĝas en ŝia nobla virto. Kvankam ŝiaj malsupraj membroj paralizigis, tamen ŝi ĉiam estas helpema, obstine batalas kontraŭ la malsano kaj persistas en lerno kaj laboro.”

“Ĉu ŝia animo estas bela?” mi demandis.

“Kompreneble, franjo Zhang havas belan animon.”

“Se homo estas mallaborema kaj malvirta, tamen aspekte bela, mode vestita kaj . . .”

“Ne, li ne estas bela, sed mal-bela.”

“Tial ni devas lerni de vere bela homo, kia Zhang Haidi. Ĉu ne?”

“Jes!”

Post kelkaj tagoj mia filino legis en gazeto novaĵon, ke iu koresponda Esperanto-kurso akceptis Zhang kiel sian honoran lernanton. Inspirite de la informo ankaŭ mia filino volas lerni Esperanton.

De tiam mi komencis lernigi al ŝi nian lingvon.

Post du tagoj ŝi venigis du najbarajn knabinetojn por kune lerni. Ili lernas ĝin diligente kaj sukcese.



# *Ĉina Sporto Marŝanta al Nova Celo*

**L**A Kvina Sport-kunveno de la Ĉina Popola Respubliko solene okazis en septembro ĉi-jare en Ŝanhajo.

La ĉiu-kvarjara sport-kunveno de Ĉinio estas ĝenerala revuo al ĝia tiuperioda sporto kaj ankaŭ movforto por disvolvi ĝian korpokulturon. Sporto, kiel rimedo por sanigi la popolon kaj inspiri la nacian spiriton, nun disvolviĝas en la ĉinaj urboj kaj kamparo. Surbaze de tio Ĉinio kulturis nombron da eminentaj sportistoj, kiuj strebas por ŝanĝi la postĝintecon de la ĉina sporto kaj krei novajn rekordojn de Azio kaj la mondo.

## INSPIRAJ SUKCESOJ

La ĉinaj sportistoj en tiu ĉi sport-kunveno akiris inspirajn sukcesojn. Guangxi-a halterlevisto Wu Shude per 128 kg. rompis la 127.5-kilograman mondan rekordon de dumana ŝirlevo je 56-kilogramma pezkategorio kaj Ŝanhaja altosaltisto Zhu Jianhua kreis novan mondan rekordon de vira altosalto per 2.38 metroj; pafistoj Ma Jun, Lin

Jicheng kaj Li Yingzi atingis mondajn rekordojn de viraj 60-pafa pafo kaj 3×40-pafa pafo per norma etkalibra fusilo kaj virina pafo per aerpistolo respektive per 600, 400 kaj 387 cirkloj; halterlevisto de 56-kilogramma pezkategorio Lai Runming per 125.5 kg. rompis la 125-kilograman mondan rekordon de junula dumana ŝirlevo; aliaj sportistoj rompis aziajn rekordojn de 9 disciplinoj, inkluzive de virina 7-disciplina kunmetita atletika konkurso kaj dumana ŝirlevo je 67.5-kilogramma pezkategorio. Krome, oni rompis ankaŭ la ĉinajn rekordojn de 60 disciplinoj, inkluzive de viraj 100-metra, 200-metra kaj 400-metra kuroj, vira 10-disciplina kunmetita atletika konkurso, vira 200-metra papilinaĝo, virina 100-metra kuro kaj virina 800-metra rapid-naĝo.

Ĉi-foje Ĉinio progresis ne nur en gimnastiko, plonĝo, flugpilkado, tablotenis, volanado kaj aliaj sportbranĉoj fortaj por si mem, sed ankaŭ en naĝo, atletiko, piedpilkado kaj aliaj malfortaj sportbranĉoj. La naĝo kaj

atletiko estas ĉefaj branĉoj de la olimpiaj ludoj, sed malfortaj por Ĉinio. La ĉinaj sportistoj tamen ne volontis postigi kaj ĉiamaniere klopodis por atingi la avangardan nivelon. 16 sportistoj kaj 4 teamoj 26-foje rompis la ĉinajn rekordojn de 14 el la 29 naĝaj disciplinoj de la olimpiaj ludoj. La mallong-distanca kuro, kiu ne havis progreson en la pasintaj jaroj, tamen ĉi-jare faris grandan paŝon antaŭen. Estas menciinde, ke en la konkursoj de naĝo kaj atletiko aperis aro da eminentaj junaj sportistoj, kiu puŝos la naĝon kaj atletikon de Ĉinio al nova etapo.

Oni rigardis la sport-kunvenon ankaŭ ĝenerala revuo al la socialisma moralo de la sportistoj kaj trejnistoj. En la konkurso la sportistoj plenforte klopodis por gajni orajn medalojn kaj la vasta rigardantaro aplaudis la brilajn ludojn de sportistoj kaj kuraĝigis la malfortajn teamojn. 106 teamoj estis elektitaj kiel tiuj de bona moralo kaj pli ol 15 000 sportistoj kaj juĝistoj ricevis premion de sporta moralo.



## AL LA OLIMPIAJ LUDOJ

En la 9-a Azia Sport-kunveno en 1982 la ĉinaj sportistoj okupis la unuan lokon laŭ la nombro de akiritaj oraj medaloj kaj teamaj poentoj, tiel ke Ĉinio fariĝis sporta potenco en Azio. Sed plejparto de la sportbranĉoj de Ĉinio ankoraŭ estas en meza aŭ malalta nivelo kaj antaŭ la ĉinaj sportistoj staras malfacila tasko pli rapide progresigi sin por partopreni en la olimpiaj ludoj.

En la pasintaj kvar jaroj la ĉinaj sportistoj montris sian forton: ili rompis 33 mondajn rekordojn kaj gajnis en internaciaj konkursoj 71 ĉampionecojn, inkluzive la ĉampionecojn gajnitajn de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo en la Tria Mondpokala Virina Flugpilka Konkurso en 1981 kaj en la Naŭa Monda Viri-

na Flugpilka Ĉampioneca Konkurso en 1982, la sep ĉampionecojn gajnitajn de la Ĉinaj Vira kaj Virina Tablotenisaj Teamoj en la 36-a Monda Tablotenisa Ĉampioneca Konkurso, plurajn ĉampionecojn gajnitajn de la Ĉinaj Vira kaj Virina Volanaj Teamoj en la grandaj mondaj konkursoj en la lastaj tri jaroj, ses ĉampionecojn gajnitajn de la ĉinaj gimnastoj en la 6-a Mondpokala Gimnastika Konkurso en 1982, ĉampionecojn gajnitajn de la ĉinaj sportistoj en plongo, pafado, akrobata gimnastiko, halterlevo kaj aliaj. Krome, la Ĉina Virina Korbopilka Teamo gajnis la trian lokon en la Monda Virina Korbopilka Ĉampioneca Konkurso okazinta en aŭgusto ĉi-jare. En la virina bazopilko Ĉinio jam enviciĝis inter la avangardaj landoj.

Tiuj sukcesoj inspiras la ĉinajn sportistojn al nova celo. La Kvina Sport-kunveno estas ankaŭ preparo de Ĉinio por partopreni en la olimpiaj ludoj de 1984. El ĝiaj 25 konkursaj sportbranĉoj 21 apartenas al tiuj de olimpiaj ludoj. Inter ili estis nove aldonitaj velado, akvo-skiado, judo kaj arta gimnastiko, en kiuj la ĉinaj sportistoj havas certan forton por konkursi en la olimpiaj ludoj de 1984.

La nombro de sportistoj kun monda nivelo en la sport-kunveno multe superis tiun de la antaŭaj kvar sport-kunvenoj. Progresis veteranaj sportistoj. Ekzemple, la monda ĉampiono de vira grundgimnastiko Li Ning faris novajn kaj malfacilajn movojn. Li aplikis movojn sur rekado al sia duringado. Krome, aperis multaj junaj eminentaj no-

### Hokeo



vicoj. Ekzemple, sag-pafistoj Li Lingjuan kaj Guo Yong de Sichuan-provinco superis veteranojn, kiuj plurfoje rompis mondan rekordon. Ili estos esperigaj en la olimpiaj ludoj.


### AMASA SPORTO

Dum la sport-kunveno leviĝis en Ŝanhajo granda entuziasmo de popolamaso por sportoj. Urbanoj ne sole rigardis la konkursojn kaj organizis aplaŭdajn taĉmentojn, sed ankaŭ diversmaniere subtenis la sport-kunvenon ekster la konkursejoj. La 18-a de septembro estis la inaŭgura tago de la sport-kunveno. Frumatene Ŝanhajaj urbanoj kaj lernantoj kolektiĝis sur la urbocentra placo kaj ĉefaj stratoj kaj okazigis dekmil-homan "stratan sport-kunvenon", inter kies partoprenantoj estis 86-jara maljunulo kaj 13-jara knabo. En ĝi oni prezentis tradician luktan gimnastikon kaj ŝnursaltadon kaj konkursis pri long-distanca kuro kaj piedpilkado. Tiuj sportistoj ne ricevis specialan trejnadon. Ili estis nur amatoroj, kiuj ĉiutage faras korpan ekzercadon.

La epizodo spegulis prosperan disvolviĝon de popolamasaj sportoj en Ŝanhajo. Ĝuste sur tiu bazo aperis eminentaj sportistoj. En la sporta aktivado Ŝanhajo estas miniaturo de la tuta Ĉinio.

En tiu ĉi sport-kunveno partoprenis 3 697 sportistoj, kiuj estis elektitaj el diverslokaj preparaj konkursoj kaj reprezentis 29 provincojn, municipojn kaj aŭtonomajn regionojn kaj iujn sportajn organizojn.

Dum la sport-kunveno reprezentantoj de 314 avangardaj kolektivoj de amasa sporta laboro



*Ĉampionino de arta gimnastiko Huang Xianyuan*

kaj avangardaj personoj venintaj el la tuta lando vizitis lernejojn de Ŝanhajo kaj rigardis diversajn amasajn sportojn en ĝia antaŭurbo por interŝanĝi kaj lerni spertojn. Granda nombro da sportosciencaj laborantoj ĉeestis la sportkunvenon por fari fakan esploron. La amasa sporto kaj konkursa sporto en kombino formis grandan forton, kiu estos garantio de Ĉinio por marŝi al la monda sporta kulmino.





# Lulilo de atletiko

**E**N Fujian-provinco, situanta apud la maro sudoriente de Ĉinio, famas du atletikaj gubernioj Putian kaj Xianyou.

La klimato de Putian estas milda kiel en printempo. Tie etendiĝas vasta ebenaĵo. Ĉio ĉi favoras al disvolviĝo de atletiko. Frue en la jaro 1863 la Putian-a Lernejo establis kurson de fizika kulturo por fari trejnadojn de altosalto, longosalto, ĵetado k. a.

En 1919 leviĝis en Ĉinio la movado de nova kulturo, kaj multaj gejunuloj de Putian forlasis sian hejmlokon por lerni aliloke. En 1924 Wu Demao, putian-ano kaj studento de Nan-

kin-universitato, gajnis la ĉampionecon de pentatlono kaj dekatlono en la Tria Tutlanda Sportkunveno okazigita en Wuchang, kio skuis la tiamajn sportistajn rondojn. De tiam kelkdek putian-anoj venis al Ŝanhajo kaj lernis tie en sportaj kolegioj. En la komenca tempo de la tridekaj jaroj ili finis sian lernadon kaj komencis fari fizikan kulturadon en sia hejmloko, dank' al tio en la gubernio vigliĝis sportado tagon post tago.

En oktobro de 1947 la sportistaj rondoj de Putian organizis vizitgrupon el 39 atletoj. Ĝi venis al la grandaj urboj Fuzhou,


Ŝanhajo kaj Nankino por partopreni en sporta konkurso kaj gajnis venkon en ĉiuj tri konkursoj. Tiu novaĵo faris sensacion en la tuta lando.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la registaro de Putian donis grandan atenton al atletiko. En 1956 estis starigita sporta gvida organo — la Sporta Komisiono de Putian-gubernio. En la sama jaro la gubernia eduka buroo ellaboris «Programon pri Fizika Kulturo en Mezlernejo». La registaro ĉiujare asignas al la eduka buroo 30-100 mil juanojn por disvolvi sportadon. En la gubernio preskaŭ ĉiuj 133 mezgradaj faklernejoj kaj ordinara mezlernejoj fondis sian atletikan teamon. Miloj kaj dekmiloj da element-kaj mez-lernejoj partoprenas en sporta ekzercado.

La Unua Mezlernejo de Putian, kiu havas historion de 77 jaroj, elkulturis nombron da elstaraj atletoj. Inter ili estas Liu Yuhuang, kiu rompis la azian rekordon de longosalto de 1982 per atingo de 8.11 metroj, Weng Kangqiang, kiu gajnis la ĉampionecon de dekatlono en la Naŭa Azia Sportkunveno, kaj Wu Jinhuang, kiu rompis la landan rekordon de 1 500-metra rapidnaĝado.

Post la unua atletika sportkunveno en 1931 la mezlernejo

*Sportistoj en elementa lernejo*



*Ekzercado post lecion-horoj*



okazigis 82 sportkunvenojn. Malgraŭ ke la guberniurbo, kie sidas la mezlernejo, estas dense loĝata, la lernejo konstruis sportejon kun areo de 8 600 kvadrataj metroj.

Kiam mi venis al la lernejo, la lernantoj faris diversajn sportajn aktivadojn. Sur la sportejo iuj altosaltis aŭ longosaltis, kaj la aliaj ludis korbopilkon aŭ flugpilkon. Laŭdire, je la kvina kaj duono ĉiumatene ili komencas sportan ekzercadon.

La 75-jara sporta instruisto Weng Zulie laboris 52 jarojn sur sia posteno. Dum la pasintaj 52 jaroj Weng elkulturis multajn elstarajn sportistojn, inter kiuj iuj estis titolitaj per doktoreco aŭ profesoreco eksterlande, aliaj rompis landajn aŭ aziajn rekordojn. La supre menciitaj Liu Yuhuang, Wu Jinhuang kaj Weng Kangqiang ja estis liaj disĉiploj. Nun Weng Zulie estas membro de la Ĉina Sporta Federacio kaj membro de la Ĉina Atleta Asocio.

Putian donis ekzemplon en disvolvo de atletiko. Dank' al ĝia influo luliloj de atletiko aperis unu post alia. Ĝia najbara

gubernio Xianyou ja estas unu el ili.

Nur kelkajn jarojn antaŭe la gubernio Xianyou komencis popularigi la amasan atletikon, sed ĝi elkulturis nombron da bonaj sportistoj. Ekz. Lin Jianxian, kiu gajnis la ĉampionecon de 200-metra kurado kaj la duan lokon de 100-metra kurado en la regiona konkurso de la Tutlanda Knaba Atletika Sportkunveno, kaj Chen Zebin, kiu gajnis la ĉampionecon de stangosalto de la Tutlanda Junula Atletika Sportkunveno.

En la tuta lando nur malmultaj postlecionaj sportaj lernejoj estas funkciigataj de komunumo, tamen en Xianyou, de post 1979 oni funkciigis naŭ tiajn lernejojn, kiuj prenis atletikon kiel sian ĉefan trejnan enhavon.


La Laidian-a Postleciona Sporta Lernejo, plej frue funkciigata de la komunumo Laidian antaŭ kvar jaroj, prenis kiel sidejon la elementan lernejon de la komunumo. Komence, la lernejo suferis de manko de monrimo kaj aparatoj. Por solvi la malfacilon, la lernejo, sub la oficiala sankcio de la gubernia registaro, starigis prilaborejon

de pakkestoj. Ĉiujare ĝi donas parton de la profito al la lernejo. Kaj krome, la Gubernia Sporta Komisiono ĉiujare asignas al la lernejo 1 000 juanojn kiel koston por sportado, kaj difinis, ke ĉiuj lernantoj senpage lernu kaj la lernantoj, kies familioj estas ne riĉaj, estu speciale subvenciataj. Antaŭe la lernejo havis nur unu kurejon 60 metrojn longan, kiu ne povis kontentigi la bezonon de trejnado. La lernantoj kaj instruistoj, transportinte ĉ. dekmilon da kubmetroj da teraĵo, konstruis 4-linian rondan kurejon 300 metrojn longan.

Putian kaj Xianyou ambaŭ prenis siajn lernejojn kiel bazon de atletiko. En tiuj lernejoj la lernantoj ricevas bonan trejnadon. Forlasinte sian lernejon, ili fariĝos aktivuloj en sportado de diversaj entreprenoj kaj ludas gravan rolon en disvolvo de sportado.

La ĉina registaro multe zorgas pri la disvolviĝo de la luliloj de atletiko kaj proponis, ke oni prenu ilin kiel bazon por kulturi elstarajn sportistojn. En 1982 Ĉinio havis 19 elstarajn atletikajn lokojn.





*Skulptaĵo sur la monumento por la akvokonduka sistemo*

**L**A 11-an de septembro 1983 Ĉinio ekhavis sian plej grandan akvoprovizan sistemon por Tianjin, per kiu oni kondukas akvon tien el Luanhe-rivero.

La 234-kilometra akvokonduka kanalo komenciĝas de la akvorezervejo Daheiting de la gubernio Qianxi, Hebei-provinco kaj finiĝas ĉe du akvoprovizejoj en Tianjin.

### **KIAL ONI DEVAS KONDUKI AKVON EL LUANHE-RIVERO AL TIANJIN**

Tianjin, la tria granda urbo de Ĉinio, havas 7.7 milionojn da

HUA MINGFANG:

## **Dolĉa akvo fluas al Tianjin**

### **— Pri akvokonduko de Luanhe-rivero al Tianjin**

loĝantoj kaj okupas gravan lokon en la industria produktado de Ĉinio.

Haihe, unu el la 7 grandaj riveroj de Ĉinio, fluas tra Tianjin, kie kunfluas ankaŭ ĝiaj naŭ branĉoj, kaj poste fluas en la maron Bohai. En la komenco de la sesdekaj jaroj, la urbo ne nur havis sufiĉan akvon por sin provizi, sed ankaŭ ofte suferis atakon de inundo.

Tamen en la lastaj 20 jaroj en la urbo multe disvolviĝis la industria produkto, kreskis la loĝantaro kaj okazis trosekeco dum longaj jaroj sinsekve, kio radikale ŝanĝis la akvoprovizan staton de la urbo. En la sepdekaj jaroj la flukvanto de la rivero Haihe en la maron malleviĝis de 3 200 milionoj da kubmetroj al 700 milionoj da kubmetroj, kaj okaze de trosekeco la rivero eĉ rompis sian fluon.

Ankaŭ la subtera akvo, unu el la akvoprovizaj fontoj, malleviĝis de la profundeco de 30-40 metroj antaŭ dek jaroj al tiu de 80-90 metroj pro troa ekspluato. Tio kaŭzis falon de tersurfaco al la areo de 174 kvadrataj kilometroj de la urbo. Pro retrofluado de marakvo la urbanoj devigite trinkis akvon salan kaj maldolĉan. Pro manko de akvo la fabrikoj estis minacataj de ĉesigo aŭ duonĉesigo de sia produkto. Statistikisto diras, ke konsumante 100 milionojn da kubmetroj da akvo,

la laboristoj de Tianjin povas krei produktovaloron de 4 000 milionoj da juanoj kaj pagi al la ŝtato 800 milionojn da juanoj da imposto kaj profito. Se la fabrikoj de la urbo ĉesigus sian produkton pro manko de akvo, do ĉiujare la perdo atingus 20 000 milionojn da juanoj. Problemo de akvo plej multe ĉagrenis la tian popolon!

Por solvi tiun urĝan problemon, la ŝtato trifoje kondukis akvon el la Flava Rivero 800 kilometrojn for de Tianjin. En 1981 kaj 1982 la ŝtato elspezis 480 milionojn da juanoj por konduki 600 milionojn da kubmetroj da akvo, tamen Tianjin nur ricevis ĝian duonon pro senĉesa vaporigo survoje kaj tralikiĝo en la longa kanalo. Tiu akvokvanto povas kontentigi nur la duonjaran bezonon de la urbo. Kion fari? La ŝtato fine decidis konduki la klaran akvon tien el Luanhe-rivero.

### **PENIGA TASKO**

Luanhe-rivero ĉ. 800 kilometrojn longa komencas sian vojaĝon de la rivero Shandian en la Interna Mongolio fluas tra la urbo Chengde kaj la gubernioj Qianxi kaj Luanxian de Hebei-provinco kaj fine enfluas en la maron. Ĝi abundas je akvo kun meznombra jara flukvanto de 4.6 miliardoj da kubmetroj, sed ĝiaj 80% koncentriĝas en julio




# Konduko de akvo de Luanhe al Tianjin


Fotoj de ZHI XU

Teknikistoj sur konstruejo

Streĉa laboro en tunelo








Jen la rivero Luanhe. Kanalo, longa je 234 kilometroj, kondukas akvon de la rivero al Tianjin, trapasantan 215 konstruaĵojn.


### Konstruejo





Konstruantoj


La akvorezervejo Daheiting



9.69-kilometra akvokonduka tunelo








La akvorezervejo Panjiakou ĉe la komenco de la kanalo povas enteni 2.9 miliardojn da kubmetroj da akvo.



Por gardi akvon de polucio, oni instalas 14.5-kilometran subteran ŝtalan tubaron kun diametro de 2.5 metroj.

La Akvoprovizejo de Tianjin traktas akvon el Luanhe, antaŭ ol fluigi ĝin al loĝdomoj kaj fabrikoj.



“Ho, kiel dolĉa akvo!”

kaj aŭgusto. Por plene utiligi la akvon oni devas reguligi ĝian flukvanton per akvorezervejoj. En 1975 oni ekkonstruis la akvorezervejon Panjiakou kun kapacito de 2.9 miliardoj da kubmetroj da akvo, kaj ĝuste tiu rezervejo ĉiujare provizas Tianjin per miliardo da kubmetroj da akvo.

La granda sinteza akvomastroma sistemo konsistas el 215 konstruaĵoj por akvon konduki, rezervi, purigi kaj distribui. Ĝiaj ĉefaj taskoj estas bori ĉ. 10-kilometran akvokondukan tunelon, ordigi 108-kilometran riverujon, fosi 64-kilometran kanalon, konstrui 115 pontojn, kvin grandajn pumpstaciojn, novan akvorezervejon kun kapacito de 45 milionoj da kubmetroj da akvo kaj akvoprovizejon kiu ĉiutage povas liveri 500 000 tunojn da purigita akvo. Post kiam la tuta sistemo pretiĝas, ĝi ĉiujare povas provizi Tianjin per miliardo da kubmetroj da akvo. Dank' al tio la akva bezono de Tianjin ĉu por la ĉiutaga vivo aŭ por produkto estas garantiata.

### BORADO DE TUNELO

La akvokonduka tunelo longa je 9 690 metroj, alta je 6.25 metroj kaj larĝa je 5.7 metroj, boriĝas tra la monto Jingzhong de la

montaro Yanshan, estas la plej longa en Ĉinio kaj ŝlosila parto de la sistemo. En frosta vintro dum dekelkaj tagoj la Ĉina Popola Liberiga Armeo sendis tien dekmil soldatojn por plenumi la taskon.

La tunelo trapasis 14 grandajn kaj malgrandajn faŭltajn zonojn, tial en ĉiu ajn tempo povus okazi ter-disfalo kaj akvo ŝpruĉus el

fendoj kvazaŭ pluvego. Malgraŭ tio la soldatoj daŭre laboris en akvo.


La tunelon oni planis finkonstrui per du jaroj, tamen ili plenumis la taskon nur per 14 monatoj. Por rapidigi la konstruadon ili fosis 17 oblikvajjn ŝaktojn sur ĉ. 10-kilometra linio kaj dividis la projektitan tunelon en 36 laborsekciojn.

La 64-kilometra kanalo estis senpage fosita de la popolo de Tianjin. Oni planis varbi 70 000 konstruantojn kaj fini la taskon per tri monatoj. Estis neatendite, ke la nombro de la volontuloj estis pli ol centmil kaj ili plenumis ĝin nur per 52 tagoj.


### HELPOJ EL LA TUTA LANDO

Por glate plenumi la taskon, 70 prospektoraj, projektaj, geologiaj, esploraj kaj sciencaj unuoj, konstruaj taĉmentoj kaj

## KONCIZA MAPO DE LA KANALO KONDUKANTA AKVON DE LUANHE-RIVERO AL TIANJIN







Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceteton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- \* Andrzej Zywień (21-j. studento), 65-536 Zielona Gora, ul. Gwardii Ludowej 10/34, Pollando, dez. kor. tutmonde. Szilagyí Dezso, Str. Furedi u 6. V/1, 7400 Kaposvár, Hungario, deziras korespondi.
- \* Mi deziras korespondi kun esp. istoj tm. Jorge Purgly, Caixa Postal, 92, 09700 Sao Bernardo do Campo, SP Brazilo.
- \* Novfondita Esp. Klubo "Futuro" serĉas kontaktojn kun kluboj kaj unuopuloj tm., prec. kun geĉinoj.


Skribu al: P. Chaloupka, Stinadla 1064, 584 01 Ledec, Ĉeĥoslovakio.

\* 18-j. fraŭlo Kent Huff, 138 Arbutus Ave., Kingsport, TN 37660, Usono, dez. kor. tutmonde kun gejunuloj pri lingvoj, politikoj kaj aliaj temoj.

\* Ili estas mezaĝaj geoficistoj, geinstruistoj kaj dommastrinoj en Italio. La eventualaj korespondantoj povos skribi rekte al la cititaj personoj.

- 1) Cattedra di Esperanto, c/o Fabbri Lea-Via Pola 10-39100 Bolzano,
- 2) Scariolo Germana-Via Fago 5 C-39100 Bolzano,
- 3) Petranzan Lotte-Via Pola 3-39100 Bolzano,
- 4) Fossati Rosanna-Via Isarco 11/6-39100 Bolzano,
- 5) Cantore Gino-Via Resia 150/5-39100 Bolzano,
- 6) Rossi avv. Claudio-Via Leonardo da Vinci 20-39100 Bolzano,
- 7) Anhof Erna-Via Visitazione 56/2-39100 Bolzano.

\* 28-j. komercisto, Paulo Mendonca, Rua Dr. Brilhante, 31, 2460 Alcobaca, Portugal, deziras kores-



pondi tutmonde pri diversaj aferoj.

\* Kontraŭ 50 PM uzitaj, ricevu samkvante la francajn. F. Neel, 24, Rue J. Mermoz, Saint-Martin/LE Pre, 51000-Chalons-Sur-Marne, Francio.

\* Al pliaĝuloj: Mi (87-j.) petas interŝanĝi pensadojn pri personaj travivaĵoj, observoj, vivfilozofio, k.t.p. D-ro Lloyd B. Mignerey, Otterbein Home, Lebanon, Ohio, U.S.A. 45036.

\* 23-j. instruistino deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj, kolektas E-librojn kaj serĉas gekorespondantojn por miaj gelnantoj de 7-j. ĝis 16-j. Krystyna Sitnik, 63-400 Ostrow Wlkp. ul. Krolowej Jadwigi 8B/9, Pollando.

alt-lernejoj de Ĉinio partoprenis en ĝia konstruado. 23 provincoj kaj municipoj fabrikis por ĝi pli ol 2 700 specialajn ekipaĵojn. Multaj provincoj kaj municipoj provizis ĝin per ŝtalo, ligno, cemento kaj aliaj materialoj. La Fervoja Ministerio disponigis specialajn vagonarojn por transporti ĝiajn bezonaĵojn.

Rekvizicii teron por la konstruaĵoj estis kompare komplika afero. La konstruo bezonis pli ol 4 000 hektarojn da kampoj. Por fari tion oni ĝenerale bezonas 2-3 jarojn. Tamen dank' al fer-

vora subteno de kamparanoj oni plenumis la taskon nur duonjaron. La gubernio Qianxi de Hebei-provinco estas fama kiel "Hejmloko de Kaŝtanoj". La tiea kaŝtano estas granda kaj dolĉa, kiu formis ĉefan enspezon por la tieaj loĝantoj. Informiĝinte, ke la akvokonduka kanalo el Luanhe-rivero al Tianjin trairos la gubernion, ili senhezite diris: "La akvokonduko al Tianjin estas gravega por la ŝtato, subteno al Tianjin estas nia devo." Tial la rekvizicio de la tero estis tre rapide plenumita.

La tuta akvokonduka sistemo kun 30 milionoj da kubmetroj da elfositaj tero kaj ŝtonoj finkonstruiĝis antaŭdate je du jaroj. 90% de la konstruaĵoj estas bonkvalitaj, ankaŭ ilia betona forteco atingis normon. La pumpstacioj kaj akvokondukaj linioj ekfunkciis nur post unufoja provo.

"La akvokonduka sistemo de Luanhe-rivero al Tianjin bone kaj rapide finkonstruiĝis, tio ja estas miraklo de la socialisma konstruo de nia lando." tiel laŭdis la popolo de Tianjin vidante la alfluantan dolĉan akvon.

## PRI LA SILKINDUSTRIO DE ZHEJIANG

**L**A Okcidenta Lago de Hangzhou, Zhejiang-provinco, estas unu el la famaj pitoreskejoj de Ĉinio. Ĝi allogas sennombrajn en- kaj eksterlandajn turistojn per siaj ĉarmaj pejzaĝoj. Tamen pli grandan famon ĝuas silko de la provinco, kiu delonge jam havas grandan debiton tra la mondo. Fremdlandaj amikoj ofte komparas ĝin kun la bela Okcidenta Lago. Ĉi-foje mi, malgraŭ longa vojaĝo, speciale veturis al la provinco por informiĝi pri ĝia silkindustrio.

Nia trajno kuris sur la bela kaj riĉa ebenaĵo Hangjiahu kaj fulme preterpasis vicojn kaj vicojn da verdaj morusarboj, kiuj etendas siajn branĉojn kvazaŭ por bonvenigi min, gaston el la norda parto de Ĉinio.

La silka produktokvanto de Zhejiang okupas la unuan lokon en Ĉinio, kaj pro tio la provinco ĝuas la renomon de "Silka Provinco". Ĝia silkoproduktado havas historion de pli ol 4 700 jaroj. En la periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770—221 a. K.) ĝia silko jam estis grandfama. En Tang-dinastio (618-907 p. K.) pli prospere disvolviĝis la silkoproduktado en Hangzhou, kie preskaŭ ĉiuj familioj sin okupis pri ĝi. La tieaj maldika kaj delikata silko kaj pompa kaj luksa brokajo servis kiel tributo al la kortego. En la 12-a jarcento la pro-

vinco fariĝis silkoprodukta bazo de Ĉinio. En la 14-a jarcento la feŭda registaro starigis en Hangzhou silkteksan administracion, kiu speciale zorgis pri silkoproduktado.

La prospereco de silkoproduktado en Zhejiang estas nedisigbla de ĝiaj naturaj kondiĉoj. Mi prenu kiel ekzemplon la ebenaĵon Hangjiahu en la norda parto de la provinco. Tie la modera klimato, abunda pluvokvanto kaj fekunda grundo tre favoras kulturadon de morusarboj kaj bredadon de silkraŭpoj. La ebenaĵo estas ne nur ĉefa silkoproduktejo de la provinco, sed ankaŭ bazo de krudaj materialoj por la silkoproduktado. Oni tre atentigas la produktejojn de krudaj materialoj. De 1980 la provinca silkokompanio kaj 51 silkofabrikejoj starigis specialan institucion provizitan per fakuloj por doni konsilojn al silkraŭpaj bredistoj. Dum rikoltado de silkraŭpaj kokonoj ili sendas grandan nombron da personoj por helpi koncernajn unuojn en aĉetado kaj bak-sekigo de tiuj kokonoj. Krome ili disponigas kemian sterkon kaj irigaciajn maŝinojn por bone kreskigi morusarbojn. En la lastaj jaroj pli grandigis la aĉetkvanto de silkraŭpaj kokonoj kaj altiĝis ankaŭ la kvalito.

Mi venis al la urbo Huzhou, ĉefa produktejo de silkraŭpaj kokonoj. Ĝi estas negranda

urbo. Post dekkelkminuta aŭtoveturado for de la urbocentro niajn okulojn jam ĝuigis originala idilia pejzaĝo: parceloj kaj parceloj da verdaj morusĝardenoj inter kamparanaj domoj.

En Waizhuang-brigado de Daochang-komunumo mi intervjuis la 38-jaran Chen Jifu, kiu estas tre lerta en bredado de silkraŭpoj. Informiĝinte pri mia intenco, li afable invitis min en kokonejon. Laŭ la malnova kutimo oni malpermesis al fremduloj eniri kokonejon, ĉar oni timis, ke ili "alportos malfeliĉon". La mastro diris al mi kun rideto, ke efektive oni timis malpurigi kokonejon kaj kaŭzi malsanon al silkraŭpoj. Nun oni bredas raŭpojn per sciencaj metodoj, kaj dank' al tio oni ne plu timas fremdulojn.

Tre laciga estas la silkraŭpa bredado. De la eloviĝo ĝis la kokoniĝo silkraŭpo dormas kvarfoje. Je ĉiu dormado ĝi dejetas sian haŭton. En malsamaj periodoj de la kreskado estas bezonataj malsamaj temperaturoj kaj humidoj en kokonejo. Krome necesas granda kvanto da morusfolioj por la bredado. Precipe post la dua kaj tria dormadoj la provizado de freŝaj morusfolioj nepre devas esti garantiata. Ĉijare la familio de Chen bredis printempajn silkraŭpojn eloviĝintajn el 2 964 kvadrataj centimetroj da papero, kiuj formanĝis





*Tinkturado*

1 750 kilogramojn da morusfolioj dum 26 tagoj. Mi vidis, ke sur verdaj morusfolioj moviĝas blankaj grasaj silkraŭpoj tre amindaj, kiujn oni karese nomas “Raŭpo-beboj”. Chen Jifu diris al mi, ke ĉi-printempe li vendis al la ŝtato pli ol cent kilogramojn da kokonoj. Parolante pri la vendado, li ridis kun brilantaj okuloj. Antaŭ miaj okuloj prezentiĝas bela sceno de kokonvendado en tiu akvoriĉa lando: Baroj plenŝarĝitaj per blankaj kokonoj veturas al urbetoj laŭ zigzagaj riveretoj, super kiuj kuŝas antikvaj arkaj pontetoj, kaj gaja ridado de kamparanoj aŭdiĝas de tempo al tempo. . .

Longan historion havas la silkindustrio de Zhejiang, tamen ĝiaj maŝinoj estas grandparte malnovaj, la produktado disa kaj la produktiveco malalta. Antaŭvespere de la fondiĝo de la no-

va Ĉinio restis en la provinco nur 11 malgrandaj kokon-elbobenejoj kaj nombro da malgrandaj silkteksejoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, dank’ al subteno de la popola registaro rapide restariĝis kaj disvolviĝis la silkindustrio de Zhejiang. Nun en la provinco formiĝis plimalpli kompleta silkindustria sistemo konsistanta el krudmaterialaj bazoj, kokon-elbobenejoj, silkteksejoj, prestinkturejoj, scienc-esploraj institutoj kaj maŝinfabrikejoj.

Enpaŝinte en la Silkteksan kaj Prestinkturatan Kombinaton en la norda parto de Hangzhou, mi estis forte impresita de ĝia imponeco. Ĝi, konstruita en 1956, estas la plej granda entrepreno de kokon-elbobonado, silkteksado kaj prestinkturo ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en la Ekstrema Oriento.

En ĝia kokon-elbobena laborejo mi vidis, ke ĉe ĉiu longa maŝino deĵoras nur 4-5 laboristinoj. Direktoro de la fabriko diris al mi, ke la maŝinoj estas aŭtomataj, se la kokonoj elbobeniĝas, la maŝinoj mem donas signalon. Poste mi informiĝis, ke en la lastaj jaroj la koncerna departemento de la provinco donis grandan atenton al renovigo de teknikoj. De 1979 ĝis 1982 la provinco forte mon-subtenis sian silkindustrion. Ĝi importis avangardajn maŝinojn de 30 specoj per pruntita fremda valuto. La renovigo de maŝinoj ne nur reduktis laborintensecon, sed ankaŭ plibonigis la kvaliton de la produktado. En 1982 99.41% de la blankaj vaporizitaj silkfadenoj produktitaj de la provinco atingis la difinitan normon.

La silkteksaĵoj de Zhejiang-provinco havas tre variajn spe-

cojn. Inter ili troviĝas silkaj ŝtofoj por fari diversajn altkvalitajn vestojn, izola silko uzata en elektra industrio kaj ornama silko uzata en restoracio, hotelo kaj familio. Nun ĉiujare ĉ. cent specoj de silkajoj de Zhejiang vendiĝas en pli ol 120 landoj kaj regionoj de la kvin kontinentoj. Sed silkindustriistoj de la provinco ne kontentiĝis pri tio. Ili diris, ke oni nepre devas senĉese novigi la specojn kaj kolorojn de la ĉina silko por ĝin debiti konstante en la internacia merkato.

La silka inkubando farita de la silkteksa fabriko Yongchang estas unu el la novaj silkaj produktaĵoj. En 1979 pli kaj pli kreskis la bezono de inkubando por komputeroj en scienc-esplora institucioj de Ĉinio. Sed tiam neniu ĉina fabriko produktis tian


rubandon. Informiĝinte pri tio, la fabriko Yongchang organizis siajn personojn por esplori la faradon kaj fine sukcesis ĝin produkti. Oni konstatis, ke ĉiu rulo da rubando povas elteni pli ol 1.2 milionojn da klavo-premoj, kaj post sunumado de 101 horoj ĝi estas ankoraŭ bone uzebla, kaj pro tio ĝi gajnis arĝentan premion de la ŝtato en 1982.

Ankaŭ la silkaj metiartaĵoj de Zhejiang antaŭlonge famiĝis en kaj ekster la lando. Vidinte en Pekino silkajn metiartaĵojn de Zhejiang, iu brita sinjorino speciale veturis al la silkteksejo Dujinsheng de Hangzhou, kie ŝi aĉetis silkajojn por ĉ. mil juanojn. Ŝi planis ekspone ilin en Londono. La nomita teksejo estas multe konata pro siaj silkaj pejzaĝoj. En 1921 ĝi faris

sian unuan brokitan pejzaĝon en du koloroj nigra kaj blanka. Nun la koloroj de la artaĵoj jam plimultiĝis al 15. Krom silkaj pejzaĝoj ĝi produktas ankaŭ silkajn tablotukojn, sofokusenojn kaj aliajn altvalorajn ornamaĵojn.

Nun la silkteksaĵo ankoraŭ estas la "reĝino" inter la teksaĵoj el naturaj fibroj. Iu amiko diris, ke oni ŝatas silkteksaĵon pro tio, ke ĝi kun silkofibroino estas aero-tralasa kaj plaĉas al la haŭto. Tamen mi opinias, ke ĝi superas la aliajn teksaĵojn per sia perla brileco, mildeco de koloroj kaj eleganteco kaj lukseco. Kun la pliboniĝo de la popola vivo silko fariĝos ĉiam pli multe bezonata. Tial mi kredas, ke la silkindustrio de Zhejiang havos pli belan perspektivon.

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Yan'an
3. Sanhajo
4. Putian
5. Xianyou
6. Tianjin
7. Hangzhou
8. Huzhou
9. Jiamusi
10. Harbin
11. Tongjiang
12. Shenyang
13. Tianshan-monto
14. Hainan-insulo
15. Hengshan-monto
16. Songshan-monto
17. Xi'an



# RENKONTE AL LA NOVA JARO

## ABONVARBA KAMPANJO

### por EL POPOLA ĈINIO



Ekde 1-a nov. 1983 ĝis 28-a feb. 1984

Tiu, kiu abonos aŭ reabonos dum tiu periodo de la kampanjo, ĝuos 20% da rabato kaj senpage ricevos Esp. koloran kalendaron por 1984.

1 jaro (12 n-roj)	£4.00	US\$ 6.00	post	=£3.20	US\$ 4.80
2 jaroj (24 n-roj)	£6.50	US\$10.00	rabatado	=£5.20	US\$ 8.00
3 jaroj (36 n-roj)	£9.00	US\$14.00		=£7.20	US\$11.20

*Atentigo: La supra tarifo ne validas por Japanio. Abonantoj kaj reabonantoj tie bonvolu atenti EPĈ-anoncon en sialandaj Esp.-periodaĵoj aŭ sin turni al la loka peranto.*

## Memoraĵoj por abonvarbantoj

Kore bonvenigata estos ĉiu, kiu volonte varbos abonantojn por EPĈ. La varbanto sendu abonant-liston kaj abon-pagojn al la loka peranto kun peto, ke la lasta enskribu lin aŭ ŝin kiel abonvarbanton. Aŭ oni sendu la liston kaj pagojn rekte al la suba adreso. Ĉin-stila memoraĵo iros al ĉiu abonvarbanto proporcie al ties akirita sukceso.

*Tamen, ne forgesu aboni aŭ reaboni por vi mem!*

**PROSPEKTON KAJ PROV-EKZEMPLERON ONI SENDOS SENPAGE LAŬ PETO**

Esperanta Sekcio de CENTRO DE ĈINAJ ELDONAĴOJ  
(GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

# HENGSHAN-MONTO

de GONG XUERU

**L**A impona Hengshan-monto staras en la gubernio Hunyuan en la norda parto de Shanxi-provinco. La monto kaj aliaj 4 montoj Taishan en Shandong-provinco, Huashan en Shaanxi-provinco, Songshan en Henan-provinco kaj Hengshan en Hunan-provinco, estas kune nomataj Kvin Famaj Montoj de Ĉinio.

Hengshan-monto de nord-oriente sudokcidenten etendiĝas pli ol 150 kilometrojn kaj havas multajn montĉenojn. Ĝi estas impona kaj vertiĝdona.

En profunda aŭtuno mi tien vojaĝis.

La Kvin Famaj Montoj havas ĉiu siajn proprajn trajtojn. Inter ili Hengshan altas 2 017 metrojn super la marnivelo, nur malpli alta ol Huashan.

Hengshan estas grava loko strategie. Antaŭ 1 500 jaroj la unua imperiestro de la Norda Wei-dinastio Tuoba Gui (386 — 409 p. K. en potenco) sendis ĉ. 10 000 soldatojn haki ĉe la montpiedo pasejon Cixia kondukan tan rekte al Pingcheng (la nuna Datong de Shanxi-provinco). Post kiam li unuigis nordan Ĉinion, li prenis Pingcheng kiel sian ĉefurbon. Kaj en la Norda Song-dinastio (960—1127 p. K.) fama generalo Yang Ye garnizonis tie kun potenca armeo, kiam li gardis la pasejojn de la Gran-

da Muro kadre en Shanxi-provinco. La armeanoj konstruis remparojn sur krutajoj kaj stariĝis pendpontojn kaj tabulajn vojojn, el kiuj iuj videblas eĉ hodiaŭ.

La monto estas alloga de longe. Sed en la pasinteco, pro malfacila trafiko ĝi estis malofte vizitata. Antaŭ pli ol 300 jaroj fama geografo de Ming-dinastio Xu Xiake (1586—1641 p. K.) explore vojaĝis en la monto kaj notis en siajn verkojn tion, kion li vidis dum sia vojaĝo. Ekde tiam des pli famiĝis la monto.

La monto situas nur kvar kilometrojn sude de la gubernia urbo de Hunyuan. Ambaŭflanke de la vojo inter la gubernio kaj la pasejo Cixia impone staras la monto Verda Ekranon dekstre kaj la Ĉiela Montpinto maldekstre. De tie fluas la rivereto Tangyu al la ebenajo.

En la montpasejo ju pli profundiĝas la valo, des pli mallarĝas la vojeto kaj altiĝas la ambaŭflanke starantaj montoj. Se oni iras pli profunden, oni povas vidi, ke sur la okcidenta krutajo alte pendas granda vico da antikvaj konstruaĵoj kun griztegolaj tegmentoj sidantaj unuj sur aliaj, kies supraĵo tuŝas la ĉielon kaj malsupraĵo rigardas al la profunda valo. Ĝi estas Templo Pendanta, la plej fama el la 18 pitoreskejoj de la monto.


La templo frontas kontraŭ la Ĉiela Montpinto kaj dorse sin kroĉas al la rokmuro de la monto Verda Ekranon. Subtenate de lignaj kolonoj, kun formo originala kaj strukturo mirinda, la templo baziĝas sur altaj rokoj. En la templo la etaĝdomoj sin apogas unuj sur aliaj kaj la diversformaj haloj estas interligitaj per zigzagaj tabulaj vojoj kaj pendpontoj. Sen ĉiĉerono la vojaĝantoj devis senti sin kvaŝaŭ en labirinto.

Komence la templo estis konstruita en la Norda Wei-dinastio. Oni diris, ke la nuna konstruaĵo estas riparita en Ming- kaj Qing-dinastioj (1368—1911). Post la fondiĝo de la nova Ĉinio ĝi estis multfoje riparita kaj zorgeme protektata.

Elirinte el la Templo Pendanta kaj surpaŝinte la montodeklivon, oni ascendas la alkrōĉitan tabulan vojon al la akvokonservejo Hengshan. La vojo kun fortikaj balustradoj estas ŝtupara, konstruita el ferbetono laŭ montdeklivo. Ĉe ĝia ekstremo estas la supro de la digo de la akvokonservejo.

La grandioza digo tranĉis la rivereton Tangyu ĉe la mezo, tial en ĝia supra baseno formiĝis bela arta lago. En la inunda sezono la kluzo malfermiĝas, kaj la akvo fluas tra la defluiga kanaletto, falas malsupren kaj formas 70 metran falakvon kun





*Akvokonservejo de Hengshan*

dense ŝprucantaj akveroj. La falakvo kune kun la templo faras la monton pli impona.

Ĉar la rivereto Tangyu estas ĉ. 50 metrojn pli alta ol la gubernia urbo, tial antaŭ la Liberiĝo, ĉiufoje kiam la montaj torentoj kuris malsupren, la rivero ŝvelis rapide kaj la inunda akvo sin ĵetis rekte al la gubernia urbo kaj kaŭzis katastrofon. Sole en 1939 la inundo englutis pli ol 4 000 homoj, ruinigis ĉ. 3 000 domojn kaj dezertigis 4 000 hektarojn da kampoj. En 1958 la tiea popolo konstruis la akvokonservejon, kio ne nur likvidis la inundan katastrofon sed ankaŭ irigacias vastajn soifantajn kampojn, kaj ebligas al la loĝantoj ankaŭ bredi fiŝojn.

Forlasinte la digon, mi iris antaŭen tra tunelo kaj surpaŝis la montvojon kondukantan al la Ĉiela Montpinto, la ĉefa pinto de Hengshan. De la montotalio prosperas altaj pinoj. La tereno estas vere kruta! Trairinte krutan vojon kaj suprenirinte

laŭ la ŝtuparo, oni atingas la pasejon Tigra Muĝado. Ĝi estas akra vojkurbiĝo, dekstre de kiu estas rokmuro kaj maldekstre profunda ravino. Tie la ventego muĝas kiel tigro, sed tuj apud la vojo staras antikva pino. Ĝi profunde enradikiĝis en la roko, kio prezentas la karakteron de pino.

Pli supre de la pasejo Tigra Muĝado troviĝas la monteto Guolao. Ĉe la monteĝo, sur glita ŝtondekklivo okulfrapas kelke da kavetoj en formo de piedsignoj de azeno kaj homo. Legendo diras, ke Zhang Guolao, unu el la Ok Feoj de taoismo, de la monto ascendis la ĉielon rajdante sur azeno. Kiam li atingis la lokon, pro kruteco kaj gliteco de la vojo li devis piede grimpi sur la monteton, tirante la azenon. Hengshan estas unu el la centroj de taoistaj aktivadoj, tial la tieaj legendoj kaj templa arkitekturo strikte rilatas kun taoismo.

Pli supre estas Chaodian-templo, la plej granda el la tem-

ploj de la monto. Interne de la ĉefa pordo de templo, trapasinte centon da krutaj ŝtupoj, oni atingas la altan ĉefhalon, en kies niĉo estas statuo de la Dio de Hengshan-monto en sida pozo.

De Chaodian-templo al la Ĉiela Montpinto oni povas iri laŭ du montvojoj. Ĉe la supro de la monto kreskas nur herboj. La loko ebligas tre agrablan birdvidon. Norde sterniĝas vasta ebena baseno, kaj la bela Hun-rivero brilas en la suno kiel arĝenta rubando kaj preterfluas la urbeton Hunyuan ĉe la montpiedo. Okcidente la akvokonservejo kiel spegulo inkrustita sur la verda tapiŝo. Oriente kaj sude ondas montoj, kiuj staras kune kun Hengshan en nebulo serpente al la horizonto. La pejzaĝo estas vere alloga!

Leviĝis vento kaj fariĝis malvarmete sur la montsupro. Mi haste malsupreniris. Kiam mi revenis en la gubernian urbon, ĝi jam estis plene iluminita.



Chaodian-templo sur Hengshan-monto

# Pejzaĝoj ĉe Hengshan-monto

Fotoj de LI WENKUI kaj LI JING






Skulptaĵoj sur antikvaj konstruaĵoj




La monto en nebulo


Hengshan-monto en vintro








Fresko en la templo Yong'an de Yuan-dinastio. Sur la fresko de 170 kvadrataj metroj oni pentris 882 homojn naturmienajn kaj belkolorajn.



Xuankong-templo





# FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ

Ponteto  
de **G. ARAB** (Irano)



Iguacu-akvofalo  
de **L. M. S. SILVA**  
(Brazilo)



## ESPERANTO INSTRUATA EN ALTLERNEJOJ DE ĈINIO

Laŭ la decido de la Eduka Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko, ke Esperanto povas esti instruata kiel unu el la nedevigaj fremdaj lingvoj en altlernejoj, nun pliaj naŭ altlernejoj de nia lando ekfunkciigis Esp-kurson. La instruistoj de sep el tiuj lernejoj estis diplomitoj de la porinstruista Esperanto-kurso funkciigita de la Ĉina Esperanto-Ligo. En septembro ĉi-jare Jinan-Universitato (en suda Ĉinio) fondis Esperanto-kurson, kiu daŭros unu jaron po kvar lecionoj ĉiusemajne. Ankaŭ la Ĉina Scienc-teknika Universitato (en orienta Ĉinio) prenis Esperanton kiel nedevigan fremdan lingvon kaj ĝin lernas 120 studentoj kaj esplorstudentoj. Esperanto-kurso aŭ progresiga kurso de Esperanto estas funkciigata ankaŭ en la Anhui-a Universitato (en orienta Ĉinio), la Hunan-a Instruista Instituto (en centra Ĉinio), la Jiangxi-a Eduka Instituto (en orienta Ĉinio), la Fujian-a Instruista Universitato, la Instruista Instituto de Interna Mongolio (en norda Ĉinio), la Wuhan-a Universitato (en centra Ĉinio) kaj la Lanzhou-a Universitato (en nordokcidenta Ĉinio).

## ZHANG QICHENG REGALIS ISTVAN JANIK

Post vizito al Jugoslavio, Zhang Qicheng, estro de la Ĉina Esperanto-Delegacio, aranĝis bankedon por regali Istvan Janik de la jugoslava ambasadorejo en Ĉinio, vespere de la 20-a de septembro. Li dankis jugoslavajn samideanojn pro ilia varma akcepto. La bankedon ĉeestis ankaŭ aliaj membroj de la delegacio kaj du laborantoj de EPĈ, kiuj vizitis Jugoslavion en 1978. Ili ĉiuj ĝojis pro la disvolviĝo de la amikeco inter la du landoj kaj kunlaborado en la Esperanto-lingva skalo

kaj montris la deziron plibonigi tiun rilaton.

## NOVA KORESPONDA ESPERANTO-KURSO

La Administra Komitato de la Anhui-a Universitato decidis fondi, en aŭgusto ĉi-jare, korespondan Esperanto-kurson en la fakultato de fremdaj lingvoj en la universitato. Ĝi daŭros unu jaron. Nun la kurso havas mil membrojn. La kurso respondas demandojn faritajn de la kursanoj en la informilo «Korespondan Esperanto-kurso» kaj «Lernado», presaĵo de Esperanto-kurso de la Anhui-a Universitato. Ĝi ankaŭ starigis staciojn en kelkaj lokoj por helpi la kursanojn en la lernado.

Ankaŭ la prepara grupo de la Esperanto-Asocio de la provinco Shanxi fondis korespondan Esperanto-kurson, kiun ĉeestis 650 personoj. La kurso daŭros ses monatojn de julio, ĉi-jare.

## ĈINA ESPERANTO-DELEGACIO RAPORTIS PRI LA 68-a UK


Antaŭtagmeze de la 16-a de septembro, la Ĉina Esperanto-Ligo

okazigis kunvenon, en kiu Zhang Qicheng, estro de la Ĉina Esperanto-Delegacio, raportis pri la 68-a UK kaj la aktivadoj de la delegacio en ĝi. En la kunveno faris raporton ankaŭ Zhu Mingyi pri la vizito de la Ĉina Esperanto-Delegacio al Jugoslavio. La kunvenon partoprenis pli ol 80 samideanoj, ili kore ĝojis pro tio, ke la Ĉina Esperanto-Ligo estis honorita per arĝenta pokalo en la 68-a UK kaj la Ĉina Esperanto-Delegacio estis varme akceptita de Hungario kaj Jugoslavio.

## SONG ZIBIN — NOVA MEMBRO DE LA ESPERANTISTA GO-LIGO INTERNACIA

Song Zibin, juna laboristo de la Pumpila Fabriko de la urbo Bengbu ŝatas veĵcion jam de sia infaneco. Li plur-foje partoprenis en veĵcionkonkurso de la provinco Anhui kaj la urbo Bengbu kaj gajnis la unuan lokon en la konkurso por la oficistoj kaj laboristoj de Bengbu en 1981. Por lerni avangardan teknikon de fremdaj landoj, li lernis Esperanton. Ĉi-jare, en Esperanto li verkis ar-

*Nedeviga kurso de Esperanto en  
Jinan-Universitato en Kantono*







*Instruistoj kaj gelernantoj de la progresiga kurso de Esperanto de la Anhui-a Universitato*

tikolon, en kiu li prezentis kelkajn novajn problemojn pri ludo de vejêio, kaj pro tio estis atentata de la Esperantista Go-Ligo Internacia. Ĝi decidis akcepti lin kiel sian membron. Li estas la unua ĉina membro en tiu internacia organizo.

#### **SURVOJE AL RESTRUKTURIĜO DE LA ESPERANTA FAKA AGADO**

Laŭ la spirito de la 68-a UK en Budapeŝto, Ch. Darbellay, ĝenerala sekretario de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), lastatempe verkis artikolon donante siajn opiniojn pri restrukturiĝo de la Esperanta faka agado. Li diris, ke ISAE estas la tegmenta, kunordiga centro de la faka agado. Jen prezentiĝas lia propono pri ĝia praktika formo:

1. ISAE nepre estas registrita asocio por ebligi ĝian oficialan agadon en ĉiuj landoj.

2. Ĉiu membro de kiu ajn scienc-faka asocio estas aŭtomate membro de ISAE.

3. Fakuloj el branĉoj, kiuj ankoraŭ ne havas propran sekcion, aliĝas rekte al ISAE. Kiam ili estos sufiĉe multnombraj kaj fortaj, ili fondos sian propran fakan asocion.

4. ISAE eldonas laŭeble plej ofte, en la komenco almenaŭ 4-foje jare, "ISAE informas" kaj distribuas ĝin plej rapide, ĉu rekte, ĉu pere de la fakaj asocioj, al la fakuloj de la mondo.

5. La financaj rimedoj venas de la fakaj asocioj, kiuj pagas iun proporcian sumon por siaj membroj, kaj de la rektaj membroj, kiuj pagas individue. Memkompreneble eblas aboni "ISAE informas" sen aliĝi al iu ajn asocio.

6. La rektaj membroj de ISAE plue eldonas la fakan revuon "Scienca Revuo".

7. En kunlaboro kun SEC (Scienca Eldon-Centro de UEA), ISAE subtenas la eldonadon de scienc-fakaj verkoj kaj kunordigas la kompiladon de "Scienca Bibliografio Esperantlingva".

8. En kunlaboro kun TeS (Terminologia Sekcio), ISAE kunorganizas la terminologian laboron kaj la diskonigon de fakaj terminoj, la fina celo estas la eldono de "Plena Scienca-Teknika Vortaro de Esperanto".

9. Alia tre grava tasko de ISAE estas helpi al la kunordigado kaj organizado de scienc-fakaj konferencoj, seminarioj, ktp.

#### **ALVOKO AL IKU**

Kadre de la 69-a UK en Vankvero okazos la 37-a sesio de Internacia Kongresa Universitato. Universitataj profesoroj kaj simile kvalifikitaj personoj povas proponi prelegon al la Komisiono pri IKU (M. Landmark kaj B. Sherwood) ĉe la sekretario: Prof. Bruce Sherwood, 252 Engr. Res. Lab., 103 S. Mathews, Urbana IL 61801, Usono. Oni sendu fotoportreton kaj kvar kopiojn de titolo, resumo, bibliografio kaj biografieto antaŭ la 10-a de januaro, 1984. Prelegantoj ricevos danksumon sed ne vojaĝajn kostojn. Oni aparte invitas proponojn de junaj universitataj instruistoj kaj profesoroj, kiuj ankoraŭ ne prelegis en IKU.

#### **LA 70-A KONGRESO DE JAPANAJ ESPERANTISTOJ**

La 70-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, kiu havis lokon en Kameoka en la 6-a kaj 7-a de aŭgusto, gajnis grandan sukceson, 888 partoprenis en la kongreso, kaj entute ĉirkaŭ 1500 partoprenis en la diversaj programeroj dum la du

## **SANE DISVOLVIĜAS LA ĈINA NACIA EKONOMIO**

Post kvar-jara reguligo la ĉina nacia ekonomio jam suriris la vojon de sana disvolviĝo.

La ĉefaj ŝanĝiĝoj okazis jene:

A. Ŝanĝiĝis la stato, en kiu tro rapide disvolviĝis la peza industrio, kompare malrapide la malpeza industrio kaj stagnis agrikulturo. Dum la 13 jaroj de 1966 ĝis 1978 la jara kreska proporcio de agrikulturo, la malpeza kaj peza industrioj estis 1:2:3. Ekde 1979 ĝis 1982 la totala produktovaloro de agrikulturo, la malpeza kaj peza industrioj pliiĝis 7.5%, 11.8% kaj 3.4% respektive ĉiujare. Ilia kreska rapideco ricevis grandan reguligon.

B. En la totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo, tiu de agrikulturo kreskis de 27.8% en 1978 al 33.6% en 1982 kaj tiu de la malpeza industrio de 31.1% al 33.4%, dum tiu de la peza industrio malkreskis de 41.1% al 33%.

C. La disvolviĝo de la konsumajo-produkto jam alkonformiĝas al la bezono de la popola vivo. De 1979 ĝis 1982 la kresko de la totala produktovaloro de agrikulturo kaj la malpeza industrio estis 10% ĉiujare, kaj ankaŭ estis 10% ĉiujare la kresko de la totala valoro de podetale venditaj sociaj komercaĵoj. La

valoro de la konkretaj konsumajoj aĉetitaj de la tutlanda loĝantaro altiĝis 7.1% ĉiujare (laŭ fiksita prezaro) kaj rimarkinde altiĝis ankaŭ la pokapa konsumo kvanto de porko kaj ŝtofo.

D. Kun disvolviĝo de la agrikultura ekonomio kaj kontinua altiĝo de la aĉetpovo de la kamparanoj la monsumo de la podetale venditaj komercaĵoj en 1982 en la kamparo pliiĝis je 82.6% kompare kun tiu en 1978, kun meznombra altiĝo de 16.2% ĉiujare. Nun la peza kaj malpeza industrioj provizas la kamparon ankaŭ per pli kaj pli multaj industriaj bezonaĵoj, konstruaj materialoj kaj aliaj produktaĵoj.

## **21 GRANDAJ KAJ MEZGRANDAJ KONSTRUOJ FINKONSTRUITAJ EN ĈINIO**

De januaro ĝis aŭgusto Ĉinio finfaris 21 grandajn kaj mezgrandajn konstruojn, urĝe bezonatajn de la lando por energio kaj trafiko. Inter ili estas kelkaj termoelektoj kaj hidroelektoj, unu dutraka fervojlinio, unu produktolinio por fabriki ĵurnalpaperon, unu akvoprovizejo kaj nombro da sukerfabrikoj.

## **NOVA NAFTA KAJ GASA KAMPO TROVITA**

Sude de la urbo Shenyang en nordorienta Ĉinio oni trovis novan

naftan kaj gasan kampon kun multaj oletavoloj. Ĝia ole-kaj gastavolo estas dika je pli ol 20 metroj meznombro kaj la plej dika naftavolo atingas eĉ 137.6 metrojn.

Nun oni jam boris 119 oleputojn, el kiuj pli ol 90 donas bonkvalitajn industriajn olefluojn. La taga oleprodukta kvanto por ĉiu puto estas 15-20 tunoj meznombro.

## **TIANSHAN-ŜOSEO TRANSDONITA AL TRAFIKO**

En Xinjiang, Ĉinio, troviĝas altaj montoj, kiuj maloportunigis la trafikon norde kaj sude de Tianshan-montaro. Nun oni finkonstruis ŝoseon kun longeco de 562 kilometroj trans la montaro kaj transdonis ĝin al uzado post ekzameno de la ŝtato. La konstruado de la ŝoseo komenciĝis en 1974.

## **"KANTO DE LA ĈINA REVOLUCIO" SURSCENIGOTA**

La granda muzik-danca epopeo "Kanto de la Ĉina Revolucio" estis provludita septembre kaj estos surscenigota decembre okaze de la naŭdeka datreveno de la naskiĝo de Maŭ Zedong, la granda gvidanto de la ĉina popolo.

La epopeo, krom uverturo kaj epilogo, entenas kvin aktojn, kiuj priskribas la grandan historian procezon de la ĉina revolucio ekde la

tagoj. Tiaj nombroj estas sufiĉe pli grandaj ol kutime ĉe la japanaj kongresoj. Aparte menciinde estas, ke ankaŭ neesperantistoj kontribuis al la sukceso de la kongreso per diversaj prezentaĵoj, kaj ke neesperantistoj-urbanoj grandnombre ĉeestis specialajn programerojn kaj rekte spertis kaj ĝuis la atmosferon de Esperanto. Tio bonaŭguras por la estonteco de nia movado.

Ankaŭ kontribuis al la internacia atmosfero de la kongreso aktiva partopreno de 30 eksterlandaj esperantistoj el 10 landoj.

En la 8-a de aŭgusto, ĉe la Oomoto-Centro, okazis festo por la 60-jara jubileo de la enkonduko de Esperanto en Oomoton kaj de la fondiĝo de Esperant-propaganda Asocio. Ĉirkaŭ 200 esperantistoj partoprenis ĝin.







*Venezuelaj dancistoj en Pekino*

Majkvara Movado de 1919. En la epopeo videblas artfiguroj de ĉinaj revoluciaj gvidantoj kiaj Maŭ Zedong, Ĝou Enlaj k. a.

La verko estos prezentata de pli ol 1 000 geaktoroj el 17 artaj unuoj de Pekino.

#### **RONG GAOTANG RICEVIS OLIMPIKAN ARGENTAN ORDENON**

71-jara Rong Gaotang honore ricevis olimpikan arĝentan ordenon. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio Rong laboris kiel vicprezidanto de la Ĉina Fizikkultura Federacio kaj ĝia ĝenerala sekretario, vicestro de la Fizikkultura kaj Sporta Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko kaj ĝia konsilanto, kaj faris kontribuojn en disvolvo de la sportoj de Ĉinio. La ceremonio por doni al li la ordenon okazis en Sanhajo. Juan Antonio Samaranch, prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato, donis al Rong olimpikan arĝentan ordenon ornamitan de florfolioj kaj kvin interkrucitaj ringoj kaj atestilon.

#### **QIAN XINZHONG RICEVIS LA UN-PREMION PRI LOĜANTARO**

La 30-an de septembro en UN J. L. Ripert, la ĝenerala sekretario de UN, donis la 1983-jaran UN-premion pri loĝantaro al Qian Xinzong, estro de la Naskolimiga

Komisiono de Ĉinio, pro lia elstara kontribuo al la ĉina naskolimigo.

Qian estas unu el la du premiitoj, kiuj ĝuis la honoron ĉi-jare. La alia estas Indira Gandhi, ĉefministro de Hindio.

#### **INTERNACIA MARATONA INVITA TURNIRO DE PEKINO**

La 25-an de septembro en Pekino okazis la Internacia Maratona Invita Turniro. La 29-jara usona sportisto Ronny Tabb gajnis la ĉampionecon per atingo de 2:18'51". Ĉina sportisto Shan Changming gajnis la okan lokon kaj fariĝis la unua ĉina sportisto, kiu enviciĝis inter la antaŭaj dek lokoj en la internacia konkurso dum la lastaj tri jaroj.

#### **LA BEOGRADA VIRINA ĤORO EN PEKINO**

La Ĥoro de la "Muzikista Domo" en Beogrado, Jugoslavio vizitis la urbojn Pekino, Dalian, Shenyang kaj Changchun de Ĉinio en la tria tagdeko de septembro kaj prezentis ĥorojn plenajn je forta nacia etoso.

La Ĥoro el studentinoj de la Konservatorio de Beograd-universitato fondiĝis en 1971 kaj multfoje faris prezentojn en aliaj landoj.

#### **LA VENEZUELAJ DANCISTOJ EN ĈINIO**

Okaze de la 200-a datreveno de la naskiĝo de Simon Bolivar, la

granda filo de la venezuela popolo kaj heroo de Latin-Ameriko, la Venezuela Dancgrupo unuafoje vizitis Ĉinion en la mezo de septembro. La programeroj prezentitaj de la geartistoj plene enkorpiĝis en si la artajn tradiciojn kaj trajtojn de ilia nacio kaj estis bone akceptitaj de la ĉinaj spektatoroj.

La dancgrupo fondiĝis en 1950 kaj havas renomon internacie.

#### **ĈINAJ ELDONAĜOJ EKSPONATAJ EN MOSKVO**

En la unua tagdeko de septembro, en Moskvo okazis la Kvara Moskva Internacia Libroekspozicio, kaj ekspoziciis tie ankaŭ ĉinaj eldonaĵoj, kiuj estis bone akceptitaj en la ekspozicio.

La ekspozicio de ĉinaj eldonaĵoj estis aranĝita de la Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOZI SHUDIAN). Tio estis la unua fojo por Ĉinio partopreni en la libroekspozicio.



## EN SENFINA ESPLORADO

**M**I konatiĝis kun Liu Shouren en iu kunsido por sciencistoj kaj teknikistoj. Inter la ĉeestantoj, tiu ĉi 50-jara intelektulo, malaltstatura, malgrasa kaj malforta, montris sin neniam distingiĝanta. Tamen, multe interesis min lia historio, ke li loĝas dum 28 jaroj en la profundo de Tianshan-montaro por reformi specojn de ŝafoj, kaj mi intervjuis lin.

En 1955 kiel eminenta studento, Liu Shouren diplomitiĝis en la brutobreda fakultato de la Nankina Agronomia Instituto. Tiam la instituto volis, ke li restu en la lernejo por labori kiel instruisto. Sed konsiderante, ke nur en paŝtejo li povos plene uzi siajn fakajn sciojn por fari ion utilan al la popolo, li petis, ke oni sendu lin al malproksima paŝta regiono, malgraŭ sia malforteco. Tiel li venis al la ŝafbredejo Ziniquan en la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

Sur la vasta stepo Liu vivis kaj paŝtis kune kun kazaĥaj paŝtistoj. Tiam ili bredis nur lokajn ŝafojn, kiuj havis fortan adaptiĝemon al ŝanĝiĝo de la klimato, sed estis malgrandaj kun pezo de malpli ol 120 kilogramoj kaj kun malmultaj kaj malbonkvalitaj lanoj, el kiuj oni povis nur fari dikan ŝnuron kaj fari

felton. Liu do decidis antaŭ ĉio reformi malnovan specon de la ŝafo por elkulturi fajnlanan ŝafon de Ĉinio.

Li legis multe da en- kaj eksterlandaj verkoj pri bredado de bonaj ŝafoj kaj komencis sian laboron super la de li paŝtitaj 360 ŝafinoj. Antaŭ ĉio li faris detalan ekzamenadon al ĉiuj ŝafinoj, numeris ilin kaj notis ĉiujn detalojn pri sia ekzameno en “dosieroj” de la ŝafoj. Post parigo de la ŝafoj, li neniam rompis sian observadon. Tage li paŝtis sur la stepo kaj nokte legis, pripensis kaj ordigis diversajn koncernajn materialojn. En la naskosezono de ŝafoj, ĉiuj liaj 360 ŝafinoj naskis ŝafidojn sinsekve dum pli ol 20 tagoj. Tiam li devis tuttage resti en malbonodora ŝafakuŝejo, iam eĉ kapturiniĝis pro lacego. Malgraŭ tio li ĉiam laboris serioze, kaj ĉio estis en bona ordo sub liaj manoj. Li tondis la umbilikan ŝnuron por ĉiuj ŝafidoj, numeris ilin, mezuris ilian pezon kaj plenigis tabelon, krome li devis zorgi la ŝafinojn kaj fari registradon . . . Li faris detalan genealogion al ĉiu aro da ŝafoj. Kiam la ŝafidoj plenkreskis, Liu Shouren atenteme observis ilian kreskadon dum la paŝtado por elkribri la malfortajn kaj restigi la fortajn. Post 9-jara klopodado li fine elkulturis

fajnlanan ŝafon “Junken”, la unuan generacion de la bonrasaj ŝafoj de Ĉinio.

Tia bonrasa ŝafo havas relative grandan korpon kaj delikatan kaj longan lanon, kies produktokvanto multe pligrandiĝis. Tial, tiu bona speco rapide disvastiĝis en multaj stepoj de Ĉinio. En 1968 fajnlana ŝafoj “Junken” estis eksponitaj en la Pekina Agrikultura Ekspozicio kaj estis multe laŭdataj.

Tamen la lankoloro de tiaj ŝafoj ne estis sufiĉe pura. Kion fari? Antaŭ li leviĝis nova problemo. Sed elkulturi bonan rason bezonas longan tempon, almenaŭ dekkelkajn jarojn. Laŭ la de li posedataj donitaĵoj kaj materialoj, li kuraĝe adoptis la generadon de proksimaj rasoj, al kiu firme kontraŭstaris fremdlandaj specialistoj. La metodo ne nur ŝparigis tempon por kulturi bonrasan ŝafon, sed ankaŭ konservigis la heredon stabilecon kaj identecon de tipo.

Baldaŭ naskiĝis la dua kaj tria generacioj de la fajnlana ŝafoj. Sekve de tio Liu elkulturis la fajnlanajn ŝafojn “Junken A” kaj “Junken B”. En 1972 ŝafoj “Junken A” estis montritaj en la tutlanda agrikultura ekspozicio kaj ricevis la unuaklasan premion donitan de la Terekspluata



# La ĉina hidroterapio

**E**STAS tre intima la rilato inter akvo kaj homo. Same kiel aero kaj nutraĵo, akvo estas nemalhavebla por la homa vivo. Plie, akvo povas kuraci malsanojn kaj hidroterapio estas aplikata en multaj landoj. La sesa numero de "El Popola Ĉinio", 1983, jam konigis senmedikamentajn terapiojn de la ĉina medicino. Ankaŭ la hidroterapio, kiun mi traktos nun, estas unu el tiaj terapioj.

La ĉina hidroterapio havas longan historion. En la ĉin-medicina verko "Huang Di Neĵ Ĝing" verkita antaŭ 2 000 jaroj oni proponis hidroterapion kaj masaĝon por kuraci iujn malsanojn. Inter la 2-a jc. p.K. kaj la 19-a jc. p.K. Zhang Zhongjing, Li Shizhen kaj aliaj famaj ĉinaj medicinistoj verkis librojn por resumi sian sperton de hidroterapio kaj tiun de antaŭuloj. Ili ra-

kontis akvotrinkan terapion, malvarman banon, brust-frotadon per malvarma akvo, dekoktaĵ-akvan banon, sidbanon, vaporbanon kaj aliajn efikajn kuracmetodojn por kuraci malsamajn malsanojn. Ne nur Ĉinio, sed ankaŭ aliaj landoj antaŭ longe sciis, ke akvo povas preventi kaj kuraci malsanojn. Scienculo de la antikva Grekio Hippocrate diris: "Akvo povas mildigi doloron, kvietigi tro aktivajn organojn kaj forigi ŝvelon kaj inflamon." Tre floris hidroterapio en la periodo de Romio.

Kun la disvolviĝo de moderna scienco pli kaj pli kreskas la nombro de hidroterapiaj specoj. Laŭ temperaturo estas bano per akvo malvarma, malvarmeta, mezvarma, varmeta kaj varma; laŭ kuracata pozicio estas bano tutkorpa kaj korpo-parta; laŭ konsisto de la banakvo estas ba-

no sen aŭ kun ingredienco (dekoktaĵo, salo, pina rezino, mustardo, sulfuro, karbona dioksido, hidrogena sulfido . . .); laŭ kuracmaniero estas bano frota, verŝa, trempada kaj duŝa; kaj laŭ premforto estas duŝo de alta, mezalta kaj malalta premo.

Hidroterapio efikas per ekscitado de akva temperaturo, akva premforto (enkonduko de kunpremita aero per tubo en basenon aŭ sitelon povas produkti kirladon kaj akvan premforton) kaj enakvaj medikamentoj al la homkorpo. Se paciento sin trempadas en akvo kun konvena temperaturo por 15-20 minutoj, kun malvarmaj malsekaj mantukoj sur la frunto kaj brusto, tiam malstreĉiĝas liaj muskoloj. La temperatura ekscito ekspansiigas la kapilarojn epidermajn, kio akcelas la sangon cirkuladon, detenas la ekscitiĝon de la centra

---

Ministerio en 1982. Tiuj bonrasaj ŝafoj ordinare pezas po 160 kilogramojn. Ili donas ne nur multe da viandoj, sed ankaŭ bonkvalitajn lanojn. Ĉiu lanero meznombro havas diametron de 23 mikronoj kaj longas 10-15 centimetrojn. Ĉiu ŝafo jare donas ĉirkaŭ 8 kilogramojn da lano, je 3-4-oblo pli multe ol la ordinara ŝafo. La purigita ŝafa lano estas blanka kiel neĝo kaj maldika kiel silkfadeno kaj jam

atingis la internacian nivelon. La purlana gabardino kun marko "Eklogo" teksita el la nomita ŝaflano estis premiita per arĝenta medalo donita de la ŝtato. La Ŝanhaja Tekstila Esplora Instituto kaj enlandaj specialistoj konstatis, ke la lano estas bonkvalita. Nun nia popolo jam povas vesti sin per la plej bonkvalita lanteksaĵo produktita de nia propra lando. Dank' al tio Ĉinio multe ŝparis fremdajn valutojn

por importi fremdlandan ŝaflanon.

Nun la bonspekaj ŝafoj elkulturitaj de Liu jam fiksloĝiĝis sur la vastaj stepoj de la tuta lando. Tamen li tute ne ĉesigis sian esploradon. Nun li klopodas por elkulturi ŝafojn kun longaj fajnaj lanoj kaj fekundajn ŝafinojn. Fininte mian viziton, mi elkore deziris al li brilan sukceson en la laboro.

nerva sistemo kaj tiel mildigas neŭralgion. Tia hidroterapio efikas precipe por kvietigi la doloron kaŭzitan de angia spasma. Por kuraci hipertension, neŭras-tenion, tutkorpan artriton, me- tabolismajn malsanojn (korpu- lenteco, diabeto) kaj aliajn mal- sanojn, se oni persiste aplikas la rutinan hidroterapion, oni certe rikoltos bonan efikon. Iu junu- lo, pro trafika akcidento, suferis splitan ostorompigon ĉe la deks- tra kubuto. Post gipsobandaĝa kuracado de la vundita brako la junulo ne povis rektigi sian bra- kon kaj fleksi ĝin je 90 gradoj, la brako perdis la funkcion. Post 50-foja apliko de hidroterapio (en kirlanta akvo), masaĝo post elakviĝo, rektigaj kaj fleksaj mo-

voj al la vundita brako, li re- akiris la funkcion de la dekstra brako. Iu stratpurigisto, vekiĝin- te matene, subite perdis la eble- con movi sian dekstran piedon. Ĝi paralizigis, sed resaniĝis post 19-foja bano en kirlanta akvo kun drogherboj.

La ĉina hidroterapio karakteri- ziĝas per tio, ke oni kuracas mal- samajn malsanojn per akvo kun dekoktaĵo de pluraj drogherboj malsamproportiaj. Ekzemple, de- koktaĵo de smilako, loranto, li- cia radiko kaj aliaj ok drogher- boj povas malstreĉi la musko- lojn kaj vigligi la sangan cirku- ladon. La akvo kun tia dekok- taĵo efikas por kuraci artriton, spondiliton kaj inflammon de lum- bomuskolaj fibroj. Post ĉ. dek

fojoj da akvokuracado paciento povas movi siajn artikojn kaj mildiĝas la doloro. Pli kaj pli progresas la ĉina hidroterapio. Oni aplikas ne nur la supran- kuracmetodon, sed ankaŭ banon per akvo kun humacido por su- ferantoj de reŭmatisma aŭ reŭ- matoida artrito, vaskularito k.a.

Akvo ludas pli kaj pli gravan rolon en medicino. Oni traktas brulvunditon per varmeta akvo. Akuŝado en akvo povas mildigi la doloron de la akuŝantino. La magnetizita trinkakvo estas uza- ta por kuraci kojliton kaj urin- organajn litiazon kaj inflammon. La miraklaj efikoj de la ĉina hidroterapio kiujn oni antaŭe ne aŭdis, jam fariĝis faktoj.



## Opinioj de niaj legantoj

*Por sondi la opiniojn de niaj legantoj pri la n-roj 1-6 de El Popola Ĉinio 1983, ni ekspedis al ili enketilojn kune kun la 6a numero. Ĝis la fino de aŭg. la enketilojn plenigis kaj resendis 253 legantoj de 29 landoj: Hispanio, Usono, Rumanio, Anglio, Japanio, Pollando, F.R. Germanio, Francio, Aŭstralio, Svedio, Belgio, Finn- lando, Nederlando, Jugoslavio, Brazilo, Italio, Danlando, Svislando, Portugalio, Kanado, Meksikio, GDR, Novzelando, Norvegio, Peruo, Aŭstrio, Grekio, Irano kaj Islando.*

*Ni esperas, ke profitante de la ideoj, proponoj kaj kritikoj de tiuj legantoj EPC fariĝos pli bona laŭ enhavo kaj aspekto kaj estos pli ŝatata de niaj samideanoj. Al ĉiuj resendintoj ni esprimas plej koran dankon.*

*Ĉi-sube ni aperigas etan parton de la vortoj de la resenditaj enketiloj, pri kiuj sendube niaj aliaj legantoj ankaŭ deziras informi. Dume, ni sincere esperas, ke la ekzemplon de tiuj resendintoj sekvos la aliaj legantoj en la venonta okazo.*

**La Redakcio de EPC**

### GENERALAJ IMPRESOJ DE EPC

EPC estas bonega revuo, pro tio vi ne zorgu. Mi esperas, ke ni abonantoj tute konfidas vian elek- ton de artikoloj. Ĝis nun vi jam montris (laŭ mia opinio) certan kapablecon por interesi la legan- tojn per prezentado de via lando. Mi deziras, ke EPC daŭrigos tian vojon.

**R.I.** (Jugoslavio)

Memkompreneble ĉiuj havas siajn proprajn preferojn kaj ŝajnas al mi ke vi ĝuste tion sukcese plenumas: distribui laŭ ĝustaj proporcioj la di- versajn interesajn temojn, tiel ke ĉiu unuopa leganto povas trovi kiel ajn sian frandaĵon.

**L.T.** (Italio)

La demando estas tro malfacila, ĉar ĉiuj artikoloj estas tiel interesaj, ke kompari ilin ne eblas. Vi mal- fermas al ni legantoj tiel kulture



koloran mondon, ke soifo kreskas de numero post numero.

**M.H.** (Finnlando)

Mi pensas, ke EPĈ estas la plej bona revuo en la E-movado. Mi kredas, ke Esperanto estos la plej grava lingvo en la mondo post kelkaj jaroj (10, 15, 20 . . .). Mi estas tre kontenta pri via revuo kaj via agado.

**B.P.** (Hispanio)

### **OPINIOJ PRI LA ENHAVO KAJ LINGVO**

Unu el la plej interesaj temoj estas la artikoloj pri la profesiaj aŭ metiaj temoj, kiuj detale rakontas pri sintenoj ĉe la laboro kaj montras diferencojn ĉe la ĉina vivado kompare kun la okcident-eŭropa kapitalist-socia vivstilo. Plej malmulte interesas viaj skribaĵoj transformi vian socian vivon kiel la okcidenta.

**A.P.T.** (Finnlando)

Estas vera regalo por mi legi la artikolojn pri "La Granda Kanalo". Ili estas poezioricaĵaj, humororicaĵaj kaj vivoplenaj, kaj ili detale priskribas ĉiun regionon. Estas treege interesa.

**F.M.** (Francio)

Artikoloj pri "La Granda Kanalo": Estas malfacile "akompani" la vojaĝanton pro manko de detala mapo. La distanco estas tiom longa, ke la bildmaterialo ne tute sufiĉas.

**O.T.** (Norvegio)

Ofte estis artikoloj malmulte precizaj (n-ro 1/p. 19). Kiel praktiki la ekzercojn?

**R.H.** (Pollando)

Ne plaĉas al mi ĉiuj artikoloj politikaj.

**M.A.M.** (Hispanio)

Ne tro plaĉas: la historio de la insurekcioj de diversaj dinastioj kaj iliaj militoj.

**M.M.** (Francio)

Unu escepto: en la 3a numero, tiu pri la ĉinaj pladoj. Kiam mi vidas tiujn bestojn preskaŭ vivaj, foriras de mi la manĝemo. . . . Mi ne komprenas, ke vi uzas sufiĉe ofte nenecesajn neologismojn (kiel ekzemple, insurekcio anstataŭ ribelado), dum ĉinoj jam avertis ke lernado de Esperanto estas por ili tre malfacila, ĉar la vortradikoj venas de fontoj tute fremdaj al ili. Efektive tiuj nenecesaj neologismoj havas preskaŭ ĉiam okcidentlingvan fonton. Mi petegas vian atenton pri tio.

**R.F.** (Belgio)

### **OPINIOJ PRI LA BILD-PAĜOJ**

La bildpaĝoj en koloroj estas tre belaj kaj ili ankaŭ plaĉas al neesperantistoj.

**A.G.** (F.R. Germanio)

Speciale mi ŝatas kovrilon de la n-ro 1 kaj kolorajn fotojn pri foiro en Kashi, kiuj estas eksterordinare realecaj, aparte plaĉas al mi fotoj de esperantistoj. Plej plaĉas al mi en via ĵurnalo diverskoloraj fotoj prezentantaj ĉiutagecon de ĉinlandanoj, kaj se vi aldonas al vi priskribojn aŭ eldirojn, mi estas kontenta.

**H.R.** (Pollando)

Estas treege interesaj kaj atentigaj la bildpaĝoj "Vidindaj Lokoĵ" kaj ankaŭ tiuj fotoj en la unuaj paĝoj de la revuo. Mi kredas, ke la kovriloj kun bildoj pri la ĉina gento estas tre atentokaptaj, ĉar ili tuj altiras atenton. Ekzemple en la 5a numero. Kaj mi kredas, ke se estus io skribita en Esperanto pri la foto supre aŭ malsupre, tio estus pli atentinda, ekzemple kiam oni vidas la gazeton ĉe ekspozicio aŭ kiam ĝi estas portata de iu en strato.

**J.F.S.** (Brazilo)

Mi havas la impreson, ke la nigra-blankaj bildoj ofte estis ne-

bulaj kaj krome ne estis klarigitaj en la teksto.

**T.N.** (Svedio)

### **OPINIOJ PRI LA RUBRIKOJ**

"Enciklopedieto de Ĉinio" estas tre informa kaj interesa. "Historiaj Urboj" donas al la leganto informon pri la plej antikvaj urboj en via lando. Ĝi ankaŭ plaĉas al mi, sed "Por Komencantoj" plaĉas al mi plej multe. Mi opinias, ke ĝi estas grandega ideo por komencantoj.

**K.H.** (USONO)

Precipe interesa kaj instrua estas la rubriko "Enciklopedieto de Ĉinio", kiu malfermas fenestron al la ĉina kulturo kaj vivo.

**Z.R.** (Jugoslavio)

"Por Komencantoj" ebligas interesi novajn e-istojn, kiuj tiel ekŝatis vian revuon.

**J.L.G.** (Meksikio)

Mi opinias tre gravaj la artikolojn en "Por Komencantoj". Sed la nova rubriko ŝajnas ne multe pli facila ol viaj aliaj. Cetere, ĝi estas mallongega, kaj neniu komencanto aĉetus EPĈ sole por tio. Laŭ mia opinio la movado bezonas apartan eldonaĵon por tiaj homoj.

**H.C.** (Anglio)

### **KELKAJ PROPONOJ**

Mi ŝatus sugesti ion al vi: kial vi ne organizas serion por lernado de la ĉina lingvo? Mi pensas ke multe da personoj interesigas pri tio. Eble vi komencas kun artikolo pri la prononcado de la ĉina lingvo.


**J.B.M.M.** (Brazilo)

Mi volus scii, kiaj plantoj estas ŝatataj de la beijing-aj virinoj (en la domo)? Ĉu ekzistas en Beijing planto-foiro? Eble tio estas ĉarma temo por artikolo: Domo kaj Planto en Beijing.

**J.M.M.** (Nederlando)

# Gaja renkontiĝo

Fotoj de YAN JIN



S-ro Chu Tunan (dekstre) kaj s-ro Bengtsson

Meze de septembro s-ro Ingemund Bengtsson, prezidanto de la Sveda Parlamento kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, vizitis Pekinon. Dum lia restado en tiu urbo s-ro Chu Tunan, prezidanto de "Amikoj de Esperanto", vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj membro de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso, intervidiĝis kun li kaj invitis lin al bankedo. La intervidiĝon kaj bankedon ĉeestis ankaŭ Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo; Ye Junjian, fama tradukisto kaj veterana esperantisto; Li Shijun, vicĉefredaktoro de "El Popola Ĉinio" kaj membro de la Akademio de Esperanto; kaj Zen Hojaŭ, vicprezidanto de la Pekina Esperanto-Asocio.

Chu Tunan diris, ke lia prezidanta moŝto estas bonvena al Ĉinio, kaj dankis lin pro lia gratulo al la fondiĝo de "Amikoj de Esperanto". S-ro Bengtsson tre ĝojis, kiam li renkontiĝis kaj interparolis Esperante kun ĉinaj s-anoj. Ili opiniis, ke Esperanto estas ideala komunikilo por diversaj popoloj, kaj ke subteno de diversaj registaroj kaj internaciaj organizoj estas necesa por disvastigi Esperanton kaj fari ĝin komuna lingvo de la homaro.

La komuna lingvo pli proksimigas ilin: Bengtsson, Chu Tunan, Li Shijun kaj Zen Hojaŭ (de dekstre).







Zhang Qicheng donacas al la gasto Esperantajn librojn.

"Ni trinku pro la bela estonteco de Esperanto, pro la sano de nia gasto!"



S-ro Ye Junjian kaj la gasto

# Gastado en Jugoslavio

Fotoj de DAI SONG'EN



Zhang Qicheng, estro de la Ĉina Esperanto-Delegacio, alparolas la inaŭguron de la ekspozicio.



Parto de la ekspozicioj

Ekspozicio de Ĉinaj Esperantaj Eldonaĵoj  
aranĝita de la Kroatia Esperanto-Ligo







Esperantistoj de Ĉinio kaj Jugoslavio deklamas poemon de la granda ĉina poeto Li Bai.




Ĉinaj esperantistoj en la vinberejo de jugoslava amiko Nejman Žarko



Jugoslava esperantisto Slavko Simunić regalias la ĉinajn gastojn per abunda pikniko.

Ĉinaj esperantistoj vizitas ŝipfarejon en Rijeka.



# KVINDEK DU FOTOJ

(Novelo)

**E**STIS frua mateno, ĉirkaŭ la sesa. Pasantoj sur la strato estis nemultaj, kaj ĉiuj en hasteco. Sed iu virino, ĉ. 50-jara, iris tre malrapide kun pezaj paŝoj, ŝajne ĉiu paŝo por ŝi estis peniga. Ŝi, en blua pantalone kaj modesta jaketo malhele griza, portis en la mano saketon el arta ledo tre ordinaran sed pufan. Ŝin sekvis 16-17-jara knabino.

“Instruistino, ne iru al la lernejo,” diris la knabino. Anstataŭ ekparoli la instruistino daŭrigis sian paŝadon. Do la knabino kontraŭvole deprenis de ŝi la pufan mansakon por faciligi ŝian iradon.

La instruistino akceptis ŝian afablecon. Transdoninte la sakon al la knabino, ŝi vere sentis sin pli facila. Ŝi levis la okulojn al la malserena ĉielo kaj diris pretervole: “Ŝajne neĝos.”

Hieraŭ vespere, de la kvina ĝis la deka, ŝi akceptis multajn vizitantojn. Ili ĉiuj esprimis al ŝi sinceran kondolencon kaj konsilis al ŝi resti hejme por moderigi la doloron pro la malfeliĉego. Sed ŝi instruis jam pli ol 20 jarojn, kaj neniam ĉesigis la laboron pro siaj privataj aferoj.

Tial, malgraŭ ke ŝi ne fermis la okulojn preskaŭ la tutan nokton, ŝi ellitiĝis kiel kutime, kiam la horloĝo vekis ŝin el duondormo je la kvina matene. Ŝi faris simplan tualetadon, prenis la sakon plenan de hejmtaskaj kajejoj de la lernantoj kaj eliris el la ĉambro. “Estas Xie Xiaoju?”

apenaŭ ŝi malfermis la pordon, ŝi kun miro rimarkis, ke ŝia malforta lernantino Xie Xiaoju staras tuj antaŭ la pordo.

“La kamaradoj sendis min ĉi tien por peti vin ne iri al la lernejo.” Ŝiaj okuloj estis ruĝaj de plorado.

La koro de instruistino Yu Min estis dolore ektuŝita, sed tamen ŝi eliris malrapide kun pezaj paŝoj.

Hieraŭ posttameze, je kvarono post la dua, la konstrua kompanio, kie ŝia filo Ĉinĉjo laboris, telefonis al ŝi, ke li estis vundita de falinta kablo de argano kaj estis sendita en hospitalon. Jen fulmo en la serena ĉielo! 43 minutojn post la dua, kiam ŝi atingis la hospitalon, ŝi vidis nur la korpon de la filo kovritan per blanka mortotuko. Ŝi ne plu povis vidi sian 19-jaran solfilon, belan kaj honestan. Ŝi estis firma virino, ŝi silentis longe sen ploro. Sed tamen ŝi sentis, kvazaŭ la blankaj muroj de la ĉambro preme falus sur ŝin, la polurita cementa planko malleviĝus kaj malleviĝus, kaj la tuta mondo ektorniĝus. Ŝi vidis nur nigron antaŭ si kaj falis svene.

Ŝi ne kredis, ke ŝia sola infano jam malaperis. Ĉu la blanka tuko povus kovri lian fortan korpon, krudecan kaj iom raŭkan voĉon, kaj same la ridojn plenajn de vigleco kaj juneco? Ne, tio ne eblas! Neniu forto povas forpreni de ŝi Ĉinĉjon.

Neĝflokaj ekfalas de la griza ĉielo.

Subite Xie Xiaoju demandis: “Instruistino, ĉu nun ne estas printempo? Kial ankoraŭ neĝas?”


Ŝi respondis en milda tono: “Tio estas printempa neĝo.”

La demando kaj respondo iris tiel trankvile, kvazaŭ nenio okazus al ili.

Xiaoju tre volis turni la atenton de sia instruistino, sed ŝi ne povis trovi taŭgajn vortojn. Kaj la instruistino ekmurmuretis al ŝi: “Ho, venas printempo.”

Jes, printempo venas postlasantante malsekajn paŝosignojn. Nemalmultaj tagoj pasis post la Printempa Festo. Kutime, en feriaj tagoj ŝi estis multe pli okupitaj. Ŝi instruas lernantojn de la tria klaso en mezlernejo, kiuj diplomitiĝos post nelonge. Kaj jam en la unua tago de la Printempa Festo lernantoj venis saluti ŝin aŭ peti ŝian helpon por lernitaj lecionoj. La vizitado kontinuus kaj ŝi eĉ ne povis trankvile manĝi. La filo domaĝis sian patrinon kaj prenis sur sin la tutan preparadon de mango dum la feriaj tagoj. Cetere li rostitis heliantajn semojn. Sed la patrino ne havis tempon por ĝui. Vespere de la kvara tago de la festo, li ne iris al kinejo nek rigardis televidon, eĉ fordankis la inviton de kamaradoj. Li fermis sin en sia ĉambro. Je la deka unua la patrino finkorektis la lastan hejmtaskan kajeron. Ŝi oscedis kaj iris dormi. Subite ŝi rimarkis, ke ankoraŭ lumas la ĉambro de la filo. Kion li faras?





Ŝi atentigis nekontente: “Enlitiĝu, jam noktomezo. Morgaŭ vi ja devos labori.” “Jes, jes”, sed la lampo ankoraŭ brilis.

La sekvantan frumatenton la patrino vidis manĝoskatolon kun kernoj de heliantaj semoj sur la tablo. Ŝi malfermis la pordon de sia filo kaj vidis, ke li dolĉe ronketas kun kapo apogita sur la tablo, kaj la planko estas dike kovrita de semŝeloj.

Tio ja okazis antaŭ unu monato. Ankoraŭ restis iom da semkernoj, sed ŝi jam plu ne povis vidi sian karan filon, kiu pretigis por ŝi la semkernojn.

Ve, Ĉinĉjo, kiel abrupte kaj rapide vi foriris ne restiginte eĉ unu vorton al via panjo. Kie nun vi estas? Trenante sin sur la strato, ŝi remaĉis la gigantan doloron teksitan el la pasintaĵo kaj la realo. Larmoj fluis de sur ŝiaj velkaj vangoj. Ŝi sentis kapturniĝon. Subite ekbrilis ŝiaj okuloj. Ho, kion ŝi vidis? Altstatura, vigla junulo kun densaj brovoj kaj plaĉa vizaĝo radianta per sincera rideto paŝis al ŝi. Ĉu tiu ne estas ŝia Ĉinĉjo?

Ŝi etendis la brakojn por brakumi lin, sed subite ŝi rimarkis blankan insignon sur lia brusto. Tio estis insigno de supera

lernejo. Ŝi malespere mallevis la brakojn kaj rigardis lin per okuloj plenaj de larmoj kaj patrineco. Ho, li ne estas Ĉinĉjo, ĉar Ĉinĉjo ne estis studento. Ŝi skuis la kapon melankolie. La studento rigardis ŝin kun miro kaj foriris kun rideto.

Kiu li estas? Ĉu li estas ŝia instruisto? Verŝajne jes. Tre multaj estis ŝiaj instruistoj, el kiuj iuj fariĝis sciencistoj, aliaj verkistoj, triaj aktoroj . . . kaj ĉiujare multaj el ŝiaj instruistoj sukcese trapasis la eniran ekzamenon por supera lernejo, kaj ŝi jam ne povas ilin ĉiujn memori klare.

Sed ŝia Ĉinĉjo malsukcesis en la enira ekzameno por supera lernejo. Kia bruo estis en la unuaj tagoj post publikigo de la nomlisto de sukcesintoj. Iu eĉ klaĉis, ke Yu Min ne meritus esti modela instruistino, kion pruvis tio, ke ŝia filo malsukcesis en la ekzameno. La klaĉoj pikis ŝian koron, sed ŝi respondis nur per apenaŭ rimarkebla amara rideto. Ĉu ŝi devis kulpigi sian filon? Ne, ŝi ne rajtis. Ŝia Ĉinĉjo estis tre diligenta kaj multesperiga infano. Vidante, ke la patrino estas tre laca de sia laboro, li mem prenis sur sin dommastrumadon anstataŭ la patrino. Li preparis manĝon, lavis vestojn kaj aĉetis grenon kaj hejtajon. Kiam li finis la laboron, li jam tute laciĝis, sed li ankoraŭ devis plenumi hejmtaskon. Komence il ofte metis siajn ekzercojn sur la tablon de la patrino por ke ŝi korektu ilin post sia laboro super la kajeroj de la lernantoj. Sed kiom da fojoj ŝi plenumis la deziron de la filo? Ŝi profunde bedaŭris, ke ŝi multe ŝuldis al la filo. Se ŝi donus al sia filo parteton de sia energia penado por la lernantoj, eble li sukcesus en la ekzameno.

Ve, ŝi pentis pri multaj aferoj. Ŝia edzo forpasis en 1967. Ŝi bone memoris, ke li skribis en sia nefinita testamento, kiun ŝi trovis inter liaj objektoj: “Min, bone kulturu Ĉinĉjon. . .” “Sed kiel mi ‘kulturis’ la filon?” Pentito kaj sinriproĉo mordetis al ŝi la koron.

Kiam Ĉinĉjo estis ankoraŭ malgranda, preskaŭ en ĉiu junulara festo aŭ nacia festo ŝi ekskursis al parko aŭ aliaj lokoj kune kun siaj lernantoj. La kompatinda Ĉinĉjo rigardis kun granda espero al la patrino, kaj oni ja facile legis tion en liaj okuloj. Sed, ĉiufoje Yu Min kun granda bedaŭro ŝlisis la plorsingultantan Ĉinĉjon en la ĉambro. Foje Ĉinĉjo faris al ŝi korpikan demandon: “Nanan en nia korto diris, ke vi estas mia duonpatrino, kaj ŝi diris ankaŭ, ke nur ŝi havas veran patrinon kaj patron, kaj ŝia patrino ofte portas ŝin al parko. Panjo, ĉu vi estas duonpatrino?” Tiam ŝi kun larmoj konsolis la filon per promeso: “Kara mia, venontjare mi certe portos vin al parko.”

Neĝeroj falis sur ŝiajn kongestitajn okulojn. Ŝi levis la rigardon al la plumba ĉielo kaj diris al si en la koro: “Ĉinĉjo, kara mia, mi portos vin al parko, mi estas via vera patrino!” Ŝia koro kvazaŭ sangis pro la dolorego.

“Instruistino, ĉu bona estas printempa neĝo?” Xie Xiaoju refoje demandis, intencante elturni sin el la malĝojo. Kaj la demando vere iom trankviligis ŝin, sed ŝi diris: “Lasu min respondi post pripenso, ĉu bone?” Xiaoju forte balancis la kapon.

Yu Min estis suspektita de sia filo kiel duonpatrino. Sed Xie Xiaoju nun iranta apud ŝi antaŭe nomis ŝin vera patrino.

Kiam Yu Min fariĝis ĉefinstruisto de tiu klaso, ŝi rimarkis, ke Xiaoju estas tre malsaneca: la vizaĝo pala, la kolo maldika, kaj la kapo ĉiam klinita, sen ajna rideto. Post nelonge ŝi informiĝis, ke Xiaoju havas duonpatrino kaj tiu traktas ŝin tre malbone, kaj ke pli malfeliĉe estas, ke ŝia patro estas geologo kaj forestas de la hejmo dum longa tempo, do Xiaoju fariĝis kvazaŭ servistino de la duonpatrino kaj ofte ne povas ricevi manĝon sufiĉan por satigi sin. Foje en sportkunveno ŝi falis svene sur la kurejo. Kuracisto konstatis, ke tion kaŭzis serioza subnutrado kaj intensa kurado. Yu Min portis ŝin en sian hejmon kaj nutris kaj flegis ŝin kiel sian propran filinon. Iun tagon, Xiaoju ĵetiĝis en la sinon de Yu Min kaj plorsingulte diris al ŝi: "Instruistino, vi estas mia vera patrino."

Neĝado daŭris kaj la pasantoj plimultiĝis. Yu Min konsciis, ke hodiaŭ ŝi iras tro malrapide.

Efektive, kiam Yu Min kaj Xiaoju atingis la lernejon, jam finiĝis memlernado kaj baldaŭ estis komenciĝonta la unua leciono de la tago, kiun Yu Min devis gvidi. Ŝi milde malfermis la pordon kaj malrapide suriris la podion.

La lernantoj montris seriozecon kaj mienis kiel la malserena ĉielo. Kaj cetere Yu Min rimarkis ankaŭ, ke sur ĉiuj freŝaj floroj sur la fenestroj pendis blankaj paperstrioj kiel funebra signo. Ŝi estis skuita en la koro, sed ne vidigis tion. Ŝi rimarkis en la klasĉambro ion nekutiman: sur la podio estas taso kun varma teo, apud la tablo staras seĝo kun kuseno ornamita per brodita krizantemo. Yu Min ne plu povis deteni sin de forta emocio kaj ŝiaj okuloj malsekiĝis. Ŝi tuj turniĝis kaj rapide for-

viŝis la larmojn. Poste ŝi returniĝis al la lernantoj, elprenis la kajorojn el la mansako kaj metis ilin sur la podion. Ŝi silente rigardis al la lernantoj penante teni sin digna kaj trankvila. Ektintis sonorilo por leciono. La klasestro ordonis per tremanta voĉo: "Stariĝu." La 51 lernantoj stariĝis je la sama momento, tiel bonorde, tiel serioze, ĉiu kun malsekaj okuloj. Yu Min ne kuraĝis rigardi rekte al ili en la okulojn kaj levis sian rigardon iom supren kaj salutis la lernantojn per kvieta kaj milda voĉo. La lernantoj rigardis unu alian sen respondi kaj tenis solene staran pozon. Yu Min ĉirkaŭrigardis ilin nekomprene. Ĝuste en tiu ĉi momento, la tuta klaso kriis unuvoĉe: "Saluton, panjo!"

Yu Min tuj sentis varmon trakturanta la tutan korpon. Ŝi konsciis, ke ŝi apenaŭ povas deteni sin de emociiĝo. La dentoj faris sur la lipo sangan premsignon, kaj la larmoj turniĝis en la okuloj. Ŝi rapide malfermis la libron kaj laŭte diris al la lernantoj: "Hodiaŭ ni lernos la tekston «Gaja Akvo-verŝa Festo» . . ."

Ŝi ne kuraĝis rigardi al la 51 paroj da okuloj briletantaj pro larmoj. Ŝi komencis legi malrapide la tekston, penante fandi sian senton kun la medio priskribita en la teksto. Iom post iom ŝi sentis, kvazaŭ ŝi jam venus al tropika arbaro de Xishuangbanna, inter gajajn taj-ojn; kiel agrable, kiam oni verŝus al ŝi freŝan akvon . . .

Ektintis sonorilo por finiĝo de la leciono, apenaŭ ŝi finis sian klarigon de la teksto. Ŝi faris profundan spiron. Ŝi sentis sin iom laca, sed ŝi estis tre kontenta pri sia lekciado. Jes, eble tio estas la plej sukcesa kaj neforgesebla leciono dum ŝia vivo.

En la klasĉambro estiĝis modera tumulto, sed neniu forlasis sian sidlokon. La klasestro stariĝis kaj iris al la podio kun io en la mano. La atmosfero en la klasĉambro fariĝis pli peza kaj solena. Li respektoplene transdonis al ŝi platan paperpakon.

Elpakinte ĝin kun miro, Yu Min trovis en ĝi delikatan fotoalbumon. Sur la unua paĝo estis klare skribite: "Al kara panjo, de viaj infanoj". Forte ekbategis al ŝi la koro. Ŝi tuj dronis denove en la doloro. Per la tremanta mano ŝi transturnis ĝin paĝon post paĝo kaj vidis sur ili fotojn de siaj instruatoj: la unua estas Liu Gang, la dua Zheng Wei, la tria . . . kaj la lasta, 51-a estas Xie Xiaoju, kiu kvazaŭ fiksas sian rigardon sur ŝi. Sed kio plue? Ŝi havas nur 51 instruatojn, kial ankoraŭ kontinuas la foliaro? Ŝi kun granda miro transturnis la 51-an paĝon kaj vidis sur la 52-a foton de sia Ĉinĉjo. Jes, tio estas ŝia Ĉinĉjo. Li rigardas per plaĉaj okuloj, kiel antaŭe, al sia patrino kun rideto. "Ho, Ĉinĉjo, mia koro, vi ne mortis, vi ankoraŭ vivas ĉe mi, kaj cetere mi havas ne nur unu, sed 52 infanojn."

Ĉenoj da larmgutoj rulfalis de sur ŝiaj vangoj . . .

Finiĝis la lecionoj. Xie Xiaoju akompanis ŝin hejmen.

La ĉielo estas ankoraŭ plumba, faladis grandaj flokoj de neĝo, sed ili tuj degelis sur la tero.

"Xiaoju", Yu Min metis sian manon sur la ŝultron de la knabino, kvazaŭ ekmemorinte ŝian neresponditan demandon, kaj malrapide diris al ŝi, "kiel ĝustatempe falas la neĝo! Ĝi humidigas la teron, tre profunde. Ĉijare la grenplantoj, herboj kaj floroj kreskos certe pli prospere . . . Ĉu ne?"





**MIA VIVO**

# OFERADO

de CHEN QIAO

*La aŭtoro*

*Si, simpla violonistino, fine fariĝis koregrafo pri nacimalplimultaj dancoj, dank' al arda amo al dancarto. Ŝi oferadis al la nacia koregrafio fraŝajn belartajn florojn unu post alia, kiujn ŝi elkulturis per sia ŝvito kaj juneco.*

**La red.**

Mi neniam imagis, ke mi amas la dancojn de nacimalplimultoj tiel profunde, ke mi sendomaĝe oferos al ili mian tutan junecon.

Mi naskiĝis en movplena marborda urbo en sudorienta Ĉinio. En 1954 mi, 17-jara hana knabino, kiel membro de arta ensemblo, venis al la montregiono Wuzhi sur la insulo Hainan, kie loĝas li-oj kaj mjaŭ-oj. Pli ol 20 jaroj pasis, kaj mi, ordinara aktorino, fariĝis koregrafo. Surbaze de lokaj folkloroj, legendoj kaj la reala vivo, mi komponis pli ol dek dancojn, kiuj estis bone akceptitaj de rigardantoj en la montregiono kaj aliaj lokoj de la lando dum sia prezentado. Kelkaj el ili estis premiitaj eĉ eksterlande kaj enlistiĝis en la repertuaron de la Nacia Kantodanca Ensemblo de Guangdong-provinco, kie mi laboras.

Tiuj sukcesoj iom min famigas, kaj miaj kolegoj min laŭdas kaj gratulas. Tamen, mi trovas, ke mi faris nenion fierindan, ĉar mi bone scias, ke mi ŝuldas miajn sukcesojn al la streĉa la-

boro de la geaktoroj, al la kuraĝigo kaj helpo de li-aj kaj mjaŭ-aj popolanoj, inter kiuj mi vivas kaj laboras.

Verdire, neniam aperis al mi en la cerbo la ideo esti koregrafo; mi deziris nenion alian ol kanti kaj danci kiel miaj kolegoj siatempe. Kiam mi estis 12 jarojn aĝa, mi aperis antaŭ la spektatoroj kiel ordinara violonistino, kiu taŭgis nur por akompani stratajn prezentadojn. Mi ne kontentis pri tio. Ofte okazis, ke ludante mi murmuredis: "Kial mi devas tion fari? Mi ja volas kanti kaj danci." Tiam al nia ensemblo mankis aktoroj, kaj oni instigis ĉiujn ĝiajn membrojn al plurflanka taŭgeco. Estis ĝojinde, ke post nelonge ankaŭ mi havis ŝancon partopreni en la provprezentado de kantoj kaj dancoj.

Tiam en nia programo troviĝis nur kantoj kaj dancoj de la hana, ujugura kaj korea naciecoj, sed neniu de la li-a kaj mjaŭ-a. Poste ni alvenis al la montregiono Wuzhi. La lokanoj varme

nin bonvenigis. Ili ne nur aranĝis por ni scenejon, sed ankaŭ nin regalis per apraĵo, cervajo kaj bona vino. Tio, laŭdire, estis tute neimagebla en la pasinteco, ĉar rezulte de han-ŝovinismo kaj nacia diskriminacio, kiujn praktikis la malnovaj regantoj sur la insulo, la montregiono dum longaj jaroj estis izolita disde la ekstera mondo, kun postĝintaj ekonomio kaj kulturo. Inter la hanaĵoj unuflanke kaj la li-aj kaj mjaŭ-aj popolanoj aliflanke formiĝis granda baro, kiu iom post iom malaperis nur post kiam la nova Ĉinio fondiĝis.

En la komenco nia ensemblo faris sensacion ĉie, kie ĝi sin trovis, sed poste ni rimarkis, ke tiu sensacio iom post iom malvigliĝis. Foje, kiam mi estis demetanta ornamajojn post dancado, kelkaj li-aj knabinoj sin turnis al mi kaj ĝentile diris, ke ili ŝatas divers-naciecajn dancojn, sed des pli tiujn de sia propra nacieco. "Ĉu vi povus prezenti por ni dancon de li-nacieco?" ili proponis. Iliaj vortoj min mal-

trankviligis. Efektive, neniam estas pravigeble, ke loka kantodanca ensemblo ne povas prezenti dancon de la loka nacieco. Sed kiel komponi la dancon? Mi iom embarasiĝis. Por tion fari al mi, kiu lernis nur en mezlernejo kaj antaŭ nelonge venis al la loko, ja mankis necesaj sperto, klereco kaj profesia trejniteco. Iuj min malkonsilis, asertante, ke mi, kiu estas unu el la ĉefaj aktoroj de la ensemblo kaj en juna aĝo, povus fariĝi elstara dancistino, se mi persistus en ekzercado. Ĉu pri tio mi mem ne pensis? Sed ĉu ni rajtas malesperigi niajn spektatorojn? Mi ne plu hezitis kaj decidis eklerni koregrafion malgraŭ diversaj malkonsiloj.

Ĝuste kun tiu intenco mi iris kaj ekvivis inter la li-aj kaj mjaŭ-aj loĝantoj. En la montregiono ĉie videblas densaj arbaroj, unutrabaj pontetoj super torentoj en ravinoj, malaltaj ŝipformaj kabanoj, vicoj da cervaj kornoj dekoracie alkroĉitaj sub tegmentrandoj kaj bovledaj tamburoj pendantaj sur grandaj banjanoj — ĉio ĉi min ravis kaj interesis, kvazaŭ mi venus en mitologian mondon. Vespere apud bivakfajro mi lernis la li-an lingvon de lokanoj vorton post vorto kaj aŭskultis iliajn rakontojn; sur montara paŝtejo mi rajdis sur bovo kaj aprecis la idilian fajfadon de paŝtistetoj; ĉe ĝojaj geedziĝaj ceremonioj gastamaj li-aj knabinoj min ebriiĝis per sia hejme preparita vino. Jes, mia vivo tie estis agrabla, sed, pli ofte, ankaŭ peniga. Foje, kiam mi lernis de lokanoj «Danco de Brulligno-kolektado», dikaj stangoj pinĉ-vundis al mi la piedon, ke mi ne povis iri dum tuta semajno. Foje por lerni lokan dancon mi piediris en forta pluvo al malproksima vilaĝo

trans montojn, inter kiuj torentis ĝisgenue profunda akvo kun terure densaj skolopendroj. Foje mi, transvadante riveron, trafis subite aperintan montaran torenton kaj tute ne sciis kion fari kontraŭ la ĉirkaŭanta malica akvo, ĝis lokanoj de li-nacieco naĝis al mi kun malplenaj benzin-tamburo kaj min elsavis. Por mi, apenaŭ 20-jara knabino, tiuj okazajoj estis iom tro severaj, sed mi ne retiriĝis. Ĝuste tiu nova vivo havigis al mi profundan amon al tiu simpla kaj sincera nacieco, kiu liveris al mi riĉan materialon por mia arta kreado.

La tria de la tria monato laŭ la lunkalendaro estas tradicia festo por li-oj. Ĉiujare post la sunsubiro en tiu tago gejunuloj, en bela ornamo, aranĝas rendezvuon sur la montdeklivo apud la vilaĝo. La knabinoj ĉiufoje alvenas la unuaj kaj sin kaŝas post arboj. Kiam la junuloj venas kaj serĉante malkovras iliajn figurojn malantaŭ ŝanceliĝantaj branĉoj, ili elpaŝas kaj honteme vualas sian vizaĝon per folioj. La junuloj do atente serĉas por si idealan fianĉinon, sed, subite la petolemaj knabinoj forkuras. La junuloj ilin sekvas kaj serĉadas, ĝisfine ĉiu el ili trovas sian plej karan. Nun la gejunuloj disiras en paroj, flustrante unu kun la alia. La junu-

loj donacas al siaj amatinoj la delonge preparitajn braceletojn kaj pinglojn el cervaj ostoj kiel simbolon de amo kaj feliĉo.

Bonŝance, mi propraokule vidis tiun feliĉan spektaklon, kiu poste fariĝis la temo de mia debuta verko — la danco «La Tria de la Tria Monato». La danco estis senatende sukcesa, kaj pluraj artaj trupoj en la lando ĝin surscenigis. Post nelonge la Ĉina Arta Ensemblo ĝin prezentis ĉe la Internacia Junulara Festivalo.

Mi vivas en la montregiono Wuzhi kaj amas la tieajn popolanojn. La lokaj samaĝuloj fariĝis miaj bonaj amikoj kaj de tempo al tempo min influas per siaj noblaj kvalitoj. Aparte interese estas, ke mi, komponante dancojn por prezenti ilian amon kaj feliĉon, ankaŭ preparis por mi mem la nektaron de amo — mi enamiĝis al honesta juna aktoro de nia ensemblo. Laŭ la loka moro ankaŭ nia geedziĝa ceremonio okazis en la tria de la tria monato, kaj amikoj de diversaj naciecoj venis gratuli nin, junan paron de han-nacieco. La feliĉa okazo por ĉiam restas en mia memoro.

En la sekva jaro post surscenigo de «La Tria de la Tria Monato», nome, en 1958 mi komponis «Pajl-ĉapela Danco». La

#### *Inter la amasoj*





# Vojaĝo al Songshan-monto

de CAO BAILONG

**S**ONGSHAN-MONTO estas unu el la kvin famaj montoj\* en Ĉinio. Ĝi situas ĉe la okcidenta parto de Henan-provinco en la centra regiono de Ĉinio. Ĉar la regiono estis la politika kaj kultura centro de la antikva Ĉinio, tial tie troviĝas multe da famaj historiaj objektoj, vidindaĵoj kaj cirkulas multaj legendoj kaj rakontoj pri ĝi. Antaŭ nelonge mi vizitis la lokon.

## ANTIKA OBSERVATORIO

Songshan-monto konsistas el du partoj: Taishi kaj Shaoshi.

Proksime al Shaoshi estas la templo de Zhou Gong, kie staras la antikva observatorio konstruita antaŭ pli ol 3 000 jaroj — Observatoria Teraso de Zhou Gong. Zhou estis fama politikisto en la 11-a jc. a. K. Dum konstruado de la orienta ĉefurbo Luoyang, li ordonis starigi la observatorion por mezuri longecon de la suna ombro kaj koni ŝanĝigon de la klimato de la kvar sezonoj. En la 8-a jc. p. K. dum la regado de la imperiestro Xuanzong de Tang-dinastio oni starigis tie ŝtonajn soklon kaj kolonon laŭ ĝia origina formo.

Sur la kolono estas gravuritaj ĉinaj ideografiaĵoj "Observatoria Teraso de Zhou Gong". La nuna teraso 2.5 metrojn alta kun perimetro de 5.5 metroj, baziĝas sur kvadrata ŝtonokolo en formo de piramido. Ĝia supro estas ortangula ŝtonkolono 2 metrojn alta. Tiam laŭ la longeco de la kolono kaj tiu de la sunombro en la somera solstico oni kalkulis ke la loko troviĝas en 34° 3' de la norda latitudo, tre proksima al la nuna 34° 4'.

Norde de la teraso staras brika teraso 9.46 metrojn alta, norde

pajla ĉapelo estas nemankigebla vivbezonaĵo por li-aj knabinoj. Ili mem zorgeme plektas tiujn delikatajn ĉapelojn el la folioj de sovaĝa planto, kiujn iliaj fianĉoj kolektis en la montaro, kaj alligas al ili siajn plej ŝatajn kolorajn rubandojn por fari ilin originalaj ornamaĵoj. La ĉapelo servas ne nur kiel pruvo pri la kapabloj de la knabinoj, sed ankaŭ kiel indiko de ilia amo kaj sopiro. Vespere mi ofte vidas, ke aroj da li-aj knabinoj kun pajla ĉapelo surkape revenas de kampoj kaj sin ordigas kaj amuzas ĉe apud-vilaĝa riveroj; nokte mi trovas ilin senlace plektantaj ĉapelojn ĉe la malforta lumo de fornoj. Tiuj scenoj facile memorigas min pri la honesteco kaj sincereco de la li-aj knabinoj. La pajla ĉapelo enkor-

pigas ilian aspiron al ĉio bela. "Jen, kiel bele ni aspektas!" — la temo de «Pajl-ĉapela Danco» ĝuste tiamaniere elkoviĝis el la aktuala vivo. La danco, konata kiel pure natura, delikata kaj bela, estis prezentita ĉe la Internacia Junulara Festivalo okazinta en Helsinko, Finnlando en 1962, kun Chen Ailian, fama ĉina dancistino, kiel la ĉefrolulo, kaj fine premiita per ora medalo.

Post tio mi komponis aliajn dancojn: «Ĝoja Transporto de Imposta Greno», kiu prezentas la gajan humoron de li-aj kamparanoj post abunda rikolto kaj ilian patriotisman entuziasmon, «Mateno en Kaŭĉuka Ĝardeno», «Sur Ondoj» kaj «Kolektado de Gastropodoj», kiuj priskribas la vivon de la unuaj kaŭĉuk-kolek-

tistoj de li-nacieco, bredistinoj de marproduktaĵoj kaj li-aj infanoj respektive, «Bovla Danco», «Printempo ĉe Wuzhi-monto», «Pramado en Nokto», «Ho, Junulo!» ktp. «Ĝoja Transporto de Imposta Greno», kiel unu el la elstaraj dancoj, estis prezentita en Rumanio, Jugoslavio, Pakistano kaj Japanio, kaj la dancoj «La Tria de la Tria Monato» kaj «Pajl-ĉapela Danco» jam filmiĝis.

Dank' al la persista klopodo dum longaj jaroj, mi fariĝis unu el la plej fekundaj koregrafoj en la lando, sed mi ne kuraĝas malstreĉi mian penadon pro la aplaŭdoj en la teatroj, ĉar ĉiun momente povus okazi, ke fervoraj spektatoroj turnus sin al mi kun demando: "Ĉu vi bonvolus prezenti por ni ion novan?"

de kiu kuŝas kvadrata ŝtono 31.9 metrojn longa, uzita por mezuri la sunan ombbron. Tiu antikva observatorio estas konstruigita de la granda astronomo de Yuan-dinastio Guo Shoujing en 1276. Guo elkalkulis ke unu tropika jaro havas 365.2425 tagojn kaj en 1280 ellaboris novan kalendaron, kies ekarto estis nur 26 sekundoj kompare kun la Gregoria Kalendaro ĝenerale uzata hodiaŭ.

Tiuj du observatorioj fariĝis antikvaj astronomiaj konstruaĵoj famaj tra la tuta mondo.

### GENERALOJ CIPRESOJ

En la korto de la studejo Songyang de Songshan-monto kreskas du grandaj arboj nomataj "generaloj cipresoj". Kial ili ricevis la nomon? Jen interesa legendo:

En la jaro 110 a. K. la imperiestro Wudi de la Okcidenta Han-dinastio faris inspektadon Kiam li atingis tien, li unue vidis altan kaj frondriĉan cipreson. La imperiestro nomumis ĝin supera generalo. La arbo ridegis

de ĝojo ĝis trunkokliniĝo kaj de tiam ĝi sin apogas sur muro.

Irinte plu antaŭen, la imperiestro trovis alian cipreson, pli altan ol la unua. Tamen la suvereno, ne povinte retiri siajn vortojn, devis nomumi ĝin la dua generalo. Aŭdinte tion, la cipreso flamiĝis de kolerero tiel forte, ke ĝia galveziko kreviĝis. Nun staras antaŭ ni la giganta arbo, ĉ. 20 metrojn alta, kies trunko estas tiel dika, ke ĝin apenaŭ povas ĉirkaŭbrakumi ok homoj kune. Ĝiaj du dikaj kurbaj branĉoj similas al etenditaj flugiloj de granda aglo. Tamen la arbo kreviĝis je la mezo kaj ĝia kavo povas enteni 5-6 homojn.

En la profundo de la korto estis la plej granda arbo. Ĝin vidinte, la imperiestro nomumis ĝin la tria generalo. Tion aŭdinte, ĝi fortege koleris kaj de tio mortis poste (fakte ĝi estis bruligita de fulmo). Tial nun en la korto videblas nur la supera kaj dua generaloj. Legendo diras, ke la du arbegoj estis plantitaj en Zhou-dinastio

antaŭ pli ol 3 000 jaroj. Sed ili ankoraŭ kreskas prospere.

Sudokcidente de la studejo staras la plej granda ŝtonplato de la monto, starigita de Tang-dinastio en 744 p. K. Ĝi estas 9 metrojn alta, 2.04 metrojn larĝa kaj 1.05 metron dika. Ĝia surskribo estas farita de Xu Hao, kaligrafo de Tang-dinastio. Sur ĝiaj soklo kaj supro estas reliefoj de militistoj, drakoj, unukornuloj kaj nuboj.

La studejo estis konstruita en la 5-a jc. p. K. La libroj konservataj estis delonge perditaj.

### FERHOMOJ EN LA TEMPLO ZHONGYUE

Por la turistoj la nomita templo estas nepre vizitinda. Tiu antikva konstruaĵaro kun ĉ. 300 ĉambroj estis starigita en la 8-a jc. p. K. por kulti la dion de Songshan-monto kaj okupas areon de 100 000 kvadrataj metroj. En la templo kreskas pli ol 300 grandaj cipresoj. Iuj el ili portas kuriozan formon, kiel kuŝanta kapro, simio kaj lotuso.

La templo havas 11 kortojn. Inter ili la halo Tianzhongge kun pordegoj sube konstruita en 1562 p. K. estas aparte impona, ĝi aspektas tre simile al la pordego Tian'anmen en Pekino. Oni diras, ke Tian'anmen estis konstruita laŭ ĝia aspekto.

En la templo la plej allogaj estas la kvar ferhomoj mulditaj en la 11-a jc. p. K. Ili altas ĉ. tri metrojn kaj bravpoze staras en antikva militista kiraso kun pugnitaĵoj. Post 900 jaroj ili ankoraŭ majeste staras en la korto. Pri la ferhomoj cirkulas legendo: En la lasta jaro (1127) de la Norda Song-dinastio, kiam la armeoj de Jin-regno invadis

*Cipreso la Supera Generalo de Zhou-dinastio*





Song-imperion, ĉinoj en la norda Ĉinio soldatiĝis unuj post aliaj. Ok ferhomoj iris norden por rezisti. Iunokte ili venis al la bordo de la Flava Rivero sen sciigo al la pordgarda dio de la templo. Sed ĉe la pramejo estis nur unu boato. Post kiam la unuaj kvar homoj transveturis la riveron, jam plene tagiĝis. La abato de la templo sendis homojn al la bordo kaj revenigis la lastajn kvar ferhomojn. Tial nun restas tie nur kvar ferhomoj.

### ANTIKVA TEMPLO SHAOLIN

La templo Shaolin estas unu el la famaj temploj de Ĉinio. Ĝi estis naskiĝloko de la budhisma ĉan-sekto kaj famkonata pro sia originala luktoarto de Shaolin.

Ĝi estis konstruita en 495 p. K. En 527 hinda bonzo Bodhidharma venis tien por prediki novan budhisman ĉan-sekton kaj sekve la templo grandiĝis pli kaj pli. Laŭ tiu sekto, se bonzoj silente sidas kontraŭ muro por kulturi al si budhisman moralon, ili do povas konscii ĝian kvintesencon. Bodhidharma sidis 9 jarojn kontraŭ la muro de la ŝtonkaverno de la montpinto Wuru malantaŭ la templo Shaolin. Dum longtempa sidado kun kruroj krucitaj, por forigi lacon, spiritan deprimiĝon kaj muskolan atrofion, li kreis luktoarton de Shaolin. Poste en Ĉinio ĉirkuilis multe da legendaj rakontoj kaj romanoj pri Shaolin-luktoarto kaj ĝiaj bravuloj en batalo kontraŭ tiranoj kaj helpo al malriĉuloj. Ankaŭ tio faris la templon fama kaj alloga por la turistoj.

La templo situas sur la montparto Shaoshi kaj antaŭ Wuru-montpinto. Ĝi aspekte estas ne

admirinda. Ambaŭflanke de la koridora vojo interne de la templo staras multaj ŝtonplatoj, sur kiuj estas bele gravuritaj antikvaj kaligrafiaĵoj kaj pentraĵoj. Tie plej allogas turistojn alta ŝtonplato kun surskribo de Li Shimin, imperiestro de Tang-dinastio. La ŝtonplato rakontis pri la hazarda amikiĝo de la imperiestro kun la bonzoj de la templo: En la finaj jaroj de Sui-dinastio Li Shimin levigis kiel estro de ribelantoj kontraŭ la tirana imperiestro Yangdi de Sui-dinastio. En batalo li estis kaptita de la malamiko. Tiam 13 bonzoj, kun Tanzong kiel la estro, de la templo lertaj en luktoarto elsavis lin el malliberejo. Post kiam Li Shimin surtroniĝis, li nomumis Tanzong supera generalo kaj ordonis starigi por li monumenton. La imperiestro permesis al la templo havi 500 bonzo-soldatojn. De tiam la templo prosperis kaj havis pli ol mil bonzojn. En la templo estas granda ŝtona muelilo kun unumetra diametro, fera kaldronego kun du-metra diametro kaj granda fera sonorilo 2.5 metrojn alta. El tiuj historiaj objektoj oni povas imagi al si la tiam prosperan templon.

En la Mil-budha Halo, plej granda halo de la templo, estas fresko de Ming-dinastio "500 Arhatoj Kultas Vairocana". La fresko de 300 kvadrataj metroj altas je 7 metroj. Ĝi estas majstra verko el la grandaj freskoj de Ĉinio.

Sur la terplanko de la halo estas 48 kavoj en kvar vicoj, ĉiu kun profundeco de ĉ. 20 centimetroj, kiuj estis formitaj de la bonzoj en luktoarta ekzercado dum longaj jaroj.

En la halo Baiyi oriente de la Mil-budha Halo estas freskoj pri



*Ferhomo en la templo de Songshan-monto*

la bonzoj en luktoarto-ekzercado kaj pri la rakonto "13 Bonzoj Savas Li Shimin".

Falis vespera krepusko. Apenaŭ mi estis forlasonta la templon, subite mi aŭdis metalfrapadon. Mi rapidis tien kaj vidis maljunan bonzon kun tri-sekcia bastono kaj junan bonzon kun ponardo en luktado. Nur post 5-6-foja luktado la ponardo de la junulo estis jam debatita de la maljunulo. Kaj ankaŭ la junulo estis faligita surteren. La maljunulo estis bonzo Haideng de la templo, 82-jara veterana luktisto. Li estis instruanta siajn disĉiplojn en lukto-arta ekzercado.

\* La kvin famaj montoj estas la orienta monto Taishan (en Shandong-provinco), okcidenta monto Huashan (en Shaanxi-provinco), suda monto Hengshan (en Hunan-provinco), norda monto Hengshan (en Shanxi-provinco) kaj meza monto Songshan.

# La sistemo de ĉinaj mezuriloj

de QIU GUANGMING

**L**A ĉinaj mezuriloj havas longan historion. Kun la estiĝo de la produktaja interŝanĝo en la lasta periodo de la primitiva socio aperis mezuriloj. Kaj en Shang-dinastio de la 16-a jc. ĝis la 11-a jc. a. K. la sistemo de ĉinaj mezuriloj estis sufiĉe kompleta. La osta mezurilo, postlasita de la dinastio, longas 16 cm. en skalo farita laŭ la decimala nombrosistemo. Tio montris, ke la unuojn de longo difinitajn laŭ la decimala nombrosistemo Ĉinio ekuzis antaŭ 3 000 jaroj.

En la periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770—221 a. K.), kun la disvolviĝo de scienco kaj tekniko la ĉinaj mezuriloj eniris novan etapon kaj aperis multspecaj mezuriloj konforme al la bezono de metiindustrio kaj komerco. Oni diras, ke Lu Ban, fama metiisto de Lu-regno, havis riĉan praktikan sperton. Li inventis ĉarpentistan mezurilon, kiu estis uzata generacion post generacio kaj laŭdata kiel universale uzebla mezurilo. En Chu-regno cirkulis ora mono kaj konforme al tio aperis malgranda pesilo, delikate farita el unu lignostango kaj kelke da ringaj peziloj, el kiuj la plej malgranda pezis 0.2 gramon. Tiam iu scienc-teknika libro rekomendis metodon fari norman pesilon, inkluzive teknikon fari bronzan alojon kaj teknikon de pesil-muldado kaj trak-

tis la normon, grandecon, kapaciton kaj pezon de ronda mezurilo. Tiam oni ankoraŭ ne povis precize elkalkuli la kvocionton de la cirkonferenco de cirklo per ĝia diametro, tial oni povis kalkuli fundan areon de ronda ujo nur per simpla metodo, kia la Pitagora teoremo. En la komenco de la 1-a jc. oni prenis la neracionalan nombron 3.1547 kiel pi por projekti kaj fari bronzan pesilon Xinmang.


En la 5-a jc. la granda ĉina matematikisto Zu Chongzhi elkalkulis kvocionton de la cirkonferenco de cirklo per ĝia diametro, kiu estis la plej preciza tiam en la mondo, kaj per ĝi ĝustigis la nomitan bronzan pesilon kaj la mezurilojn de Militantaj Regnoj. Dum farado de mezuriloj oni plene utiligis la tiamajn avangardajn sciencojn kaj teknikon.

Por garantii la konstantan stabilecon de mezuriloj, en la posta periodo de Militantaj Regnoj oni komencis uzi naturajojn kun bona stabileco kiel normon de mezuriloj. En Han-dinastio (206 a. K. — 220 p. K.) estis aplikata la teorio pri ĝustigado de mezurilo per muzika tubo farita el jado, bronzo aŭ bambuo. Ju pli longa estas la tubo, des pli malalta estas la frekvenco kaj sekve des pli malalta la sono. Se la longo de la tubo estas

determinita, do la pitĉo estas certigita. Inverse, se la frekvenco de la tubo estas determinita, do estas certigita ĝia longo. Tiu praktiko koincidas kun la projekto preni la ondlongon de lumo kiel referencon de longo en la nuna tempo. Antaŭ 2 000 jaroj ĉinaj laboruloj trovis ankaŭ, ke la aera temperaturo kaj humido influas la normon de mezuriloj. Ili uzis metalon kaj akvon kun specifa pezo kiel la normon de pezo.

En 221 a. K. la Unua Imperiestro de Qin-dinastio unuigis Ĉinion. Por plifortigi sian regadon kaj garantii la ŝtatan enspezon per impostkolektado, li publikigis edikton, ke oni unuigu la sistemon de mezuriloj de la tuta lando per tiu de Qin-dinastio (unu ĉi-o egalas al ĉ. 23 centimetroj, unu ĝin-o al 250 gramoj kaj unu ŝeng-o al 200 mililitroj). Samtempe li limigis permesblan ekarton de la mezuriloj. Nun estas trovitaj pli ol 100 tiaj mezuriloj, kiuj surhavas gravuritan edikton de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio kaj servas kiel gravaj materialoj por esplori la tiamajn mezurilojn. La unuigita sistemo de mezuriloj starigita de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio estis heredita kaj kompletigita de Han-dinastio kaj tiel travivis pli ol 400 jarojn en la vasta teritorio. La sistemo de mezur- kaj pez-unuoj kaj la





**Tarifo:** 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- \* 30-j. Marcela Kaminska, Narodna Trieda 29, 04001 Kosice, Ĉeĥoslovakio, dez. kor.
- \* 23-j. biologino/genetikistino, dez. kor. tm. Intereso: hundoj, psikologio, hungara lingvo. F-ino Roze Aukstikalnyte, Janonio 27, SU-235250 Pasvalys, Litovio, USSR. (kun foto)
- \* 15-j. fraŭlino Wanda Romaszkan, Ol-568 Warszawa, ul. Zaulek 11/

13 m 5, Pollando, deziras korespondi.

- \* 14-j. Johan Lindstrom, Skogsangsvagen 30, S-135 55 Tyreso, Svedio, deziras korespondi.
- \* 24-j. studento, Ronald Schindler, W.-Pieck-Str. 44, DDR-2090 Templin, dez. kor.
- \* S-ro Atanas Vasilev Dimitrov, 4486 dep. Pazardjik v. Ljahovo, Bulgario, dez. kor. kun ĉinoj.
- \* S-ro Mihaly Szekeres, Futo u. 1/a, H-6900 Mako, Hungario, deziras korespondi.
- \* S-ro Mariusz Dastych, 00-028 Warszawa, ul. Bracka 22. Pollando, deziras korespondi.
- \* F-ino Renee Correy, 10, Rue Des Courtils, F-25000 Besancon, Francio, deziras korespondi.
- \* Czach Lidia, Rzeszow 35-112, Bohaterow 34/18, Pollando, dez. kor.
- \* 45-j. Khun Zdenek, Horice vp. Sladkovskeho 103 508 01 Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi pri ĝardenado.
- \* Danuta Kowalska, 33-300 Nowy

Sacz, ul. Broniewskiego 8B/7, Pollando, volas korespondi kun mezaĝaj ĉinaj virinoj.

- \* Lubka Mandalova, j.k. V. Ivanov bl. 315 vh. Vap. 50, 1309 Sofio, Bulgario, deziras korespondi.
- \* Ŝterju Kukuŝev (Bulgara Sekcio de ILASE) Str. Oborište 15,4550 Peŝtera, Bulgario, dez. kor. kun agrikulturaj specialistoj.
- \* Bubenikova Jirina, Nadrarm 48d, Sternberk, Ĉeĥoslovakio 78501, volas korespondi kun iu el Pekino aŭ alia pli granda urbo de Ĉinio.
- \* Gerhard Bottcher, C'asabra, Hauptstr. 12, DDR-7261 serĉas korespondanton el Ĉinio.
- \* 30-j. Andreo Szczudio, Gawie-niance 4, 16-500 Sejny, Pollando, volas korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj.
- \* S-ro Geier Artut, Vitazstva 87/1, 971 01 Prievidza, Ĉeĥoslovakio vol. kor. pri ĉiutaga vivo.
- \* S-ano Simeon, Krastev-Vraca, 3000 Bul. Tolbuĥin, 94, En-G, Bulgario, ŝatas korespondi kun ĉinaj samideanoj pri ĉiuj temoj.

reguloj de administrado kaj kontrolado starigitaj de la generacioj post Han-dinastio estis daŭrigo kaj disvolvo de tiuj de Qin-dinastio. Ekz., la unuoj de longo *fen-o*, *cun-o*, *ĉi-o* kaj *ĝang-o*, la unuoj de kapacito *ŝeng-o*, *doŭ-o* kaj *hu-o* kaj la unuoj de pezo *ĝin-o* kaj *liang-o*, ĉiuj prenis la sistemon de Qin-dinastio.

Post 1736 Ĉinio ekhavis kontakton kun aliaj landoj koncerne al mezuriloj. La registaro de Qing-dinastio rajtigis sian ambasadorejon en Francio peti la Parizan Establaĵon pri Internacia Mezur-sistemo fari unu mezurilon por *ĉi-o* (32 cm.) kaj unu pesilon por *liang-o* (37.3 g.). Ekde tiam la ĉinaj kaj interna-

ciaj mezur- kaj pezunuoj estas oficiale konverteblaj. En 1928 la ĉina registaro decidis tute uzi la internacian sistemon kaj preni kiel transiran formon la ĉinan sistemon, ĝenerale praktikatan en la ĉina merkato. Oni povas facile konverti ilin unu al la alia, nome: Unu metro egalas al tri *ĉi-oj*, unu kilogramo al du *ĝin-oj* kaj unu litro al unu *ŝeng-o*. Post multjara praktiko do tiu nova ĉina mezursistemo estis iom post iom popularigita en Ĉinio.

En 1959 la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko publikigis dekretan, ke la internacia mezursistemo estu unuigita mezurila kaj pesila sistemo de

Ĉinio, kaj faris en la tuta lando energian propagandon. En la lastaj jaroj Ĉinio rapide disvolvis scienc-esploradon pri la ĉinaj mezuriloj kaj atingis grandajn sukcesojn. Ĝi faris nombron da normaj aparatoj, kiel fotoelektra interferometro, lasera gaŭĝobloka interferometro kaj du-dimensia mezura maŝino kaj 100-Tf referenca mort-peza maŝino. Ankaŭ ĝia esplorado pri la precizeco de ses fizikaj kvantoj de metro, sekundo, ampero, kelvino, kilogramo kaj kandelo preskaŭ aŭ tute atingis la internacian avangardan nivelon. La mezurscienco de Ĉinio ludas ĉiam pli gravan rolon en ĝia ekonomia konstruado kaj la vivo de ĝia popolo.

# LA PROSPERA EKONOMIO DE TANG-DINASTIO

de BA HONG

**E**N sia prospera periodo Tang-dinastio havis vastan teritorion, kiu etendiĝis oriente ĝis la maro, okcidente ĝis Aralo, sude ĝis la Suda Ĉina Maro kaj norde trans Bajkalon. Tiam en Tang-imperio vivis pli ol naŭ milionoj da familioj kun pli ol 52 milionoj da loĝantoj. Ĝi estis unuigita kaj civilizita prospera feŭda imperio kun multaj naciecoj.

## AGROKULTURO KAJ METIO

En pli ol 100 jaroj post sia fondiĝo en 618 p. K., Tang-dinastio praktikis kompare bonan politikon, tial la produktado rapide disvolviĝis, kaj la ŝtato akumulis sufiĉe grandan kvanton da riĉaĵoj, dank' al la diligenta laboro de la vasta kamparanaro kaj metiistaro.

Laŭ historiaj notoj, en 747 p. K., la ĉefaj grenejoj de la lando konservis 759 000 tunojn da greno, el grenejo Hanjia en Luoyang estis la plej granda. En 1971 ĉinaj arkeologoj prifosis la ruinon de la grenejo Hanjia kun areo de 420 000 kvadrataj metroj. Ĝi havis 400 subterajn grenkelojn, kiuj povis enteni 34 800 tunojn da greno. En unu el la grenkeloj ankoraŭ restis ĉ. 250 tunoj da milio jam karbiĝinta. Tio montris, ke la tiama agrokulturo jam atingis rimarkindajn sukcesojn, tial la ŝtato


povis akumuli grandan kvanton da superflua greno.

Tang-dinastio alte taksis akvoutiligon. Historiaj notoj diris, ke tiam en la lando estis 264 akvoutiligaj instalaĵoj, kiuj multe akcelis la agrikulturan produktadon.

En Tang-dinastio ankaŭ metio rapide disvolviĝis. La ŝtataj metiejoj estis grandaj, kun detale dividitaj laborspecoj. Iliaj produktajoj estis liverataj speciale al la imperiestraj familio kaj parencoj kaj ŝtataj oficejoj. En la ĉefurbo Chang'an estis metiejo por fari ĉiutagajn bezonaĵojn por la imperiestro. Tie laboris pli ol 19 000 metiistoj. Ankaŭ


la privata metio rimarkinde disvolviĝis. En la ĉefurbo funkciis diversaj metiejoj privataj, kiel tiuj de paperfarado, tinkturado, kupraĵo-farado, silkajo-farado kaj aliaj. Kaj en la vasta kamparo troviĝis granda kvanto da familiaj metiejoj, kies produktajoj servis ĉefe por konsumado de la kamparanoj mem kaj impostpago al la ŝtato. Nur malgranda kvanto da produktajoj estis vendata en foiro.

Te-prilaborado estis nova metio tiutempe. En Tang-dinastio ĉiuj sudaj provincoj kulturis te-arbojn kaj la tea imposto fariĝis grava por la ŝtato. Tiam Lu Yu verkis libron pri teo, la plej



*La urbo Chang'an de Tang-dinastio*





*Parto de Daming-palaco*

fruan fakan verkon pri tiu temo en la mondo, kiu sisteme priskribis la kulturadon de te-arboj kaj te-folian prilaboradon.

Porcelano-farado fariĝis sendependa metio. Bakfornoj troviĝis ĉie en la sudo kaj nordo de nia lando. Ili produktis ne nur porcelanaĵojn bezonatajn por ĉiutaga vivo, sed ankaŭ delikatajn artajn ceramikaĵojn. La trikoloraj ceramikaĵoj kun freŝaj koloroj flava, verda kaj blanka estis elstara atingo en la ceramika metio de Tang-dinastio.

En Tang-dinastio paperfarado multe disvolviĝis. Lina, brusonetia, morusarba kaj rotanga ŝeloj, bambuo kaj tritika kaj riza tigoj ĉiuj povis esti uzataj kiel materialo por paperfarado. Estis diversaj specoj de papero kun variaj koloroj kaj por malsamaj uzoj. Precipe menciinda estas Ŝjuan-papero. Ĝi estas delikata, blanka, mola kaj kolorkonserva kaj ankoraŭ hodiaŭ uzata por fari ĉinstilajn pentraĵojn kaj kaligrafiaĵojn.

La lignoplata presarto aperis almenaŭ en la komenca periodo de Tang-dinastio. Per tiu ĉi presarto oni gravuris skribaĵojn kaj bildojn sur lignoplato kaj poste presis ilin sur papero. La budhisma libro "Vajra sutro" estas plej frue presita per tiu ĉi metodo en 868 p. K. en Ĉinio.

## LA GRANDIOZA URBO CHANG'AN

En Tang-dinastio aperis multaj grandaj komercaj urboj, inter

ili estis la ĉefurbo Chang'an, Luoyang, Yangzhou kaj Guangzhou (la nuna Kantono). La plej granda kaj prospera urbo estis Chang'an (sude de Xi'an de la nuna Shaanxi-provinco).

Chang'an estis longa de la sudo ĝis la nordo je 8 651 metroj kaj de la oriento ĝis la okcidento je 9 721 metroj kaj ĝia periferio estis ĉ. 36 kilometroj.

En la urbo etendiĝis 11 sudnordaj kaj 14 orient-okcidentaj stratoj larĝaj kaj rektaj, kiuj dividis la urbon en 108 loĝkvartalojn kaj la orientan kaj okcidentan partojn metian kaj komercan. En la urbo vivis preskaŭ miliono da loĝantoj. La kvartaloj estis kvadrataj, je pli ol 30 metroj larĝis ĉiu strato, ambaŭflanke de kiu kreskis ombroriĉaj arboj kaj staris diversaj vendejoj. Je la tagmezo oni frapis tamburon 300-foje por anonci komencon de negoca aktivado. Je la sunsubiro oni frapis gongon 300-foje kaj la vendejoj fermis la pordon. Je la tagiĝo oni batis stratan tamburon kaj malfermiĝis la pordoj de la urbo kaj la kvartaloj. Ili fermiĝis je la vespera tamburado kaj je tio la loĝantoj devis reveni hejmen. Laŭleĝe nokta vojirado sur strato estis malpermesita.

En la urbo faris prezentadon multaj famaj artistoj, kiaj ŝnur-dancistinoj kaj akrobatoj. Knabo-akrobato povis fari diversajn movojn ĉe la supro de longa stango starigita sur la kapo de akrobato.

Meze de la norda parto en la urbo estis la Palaca Urbo kun la palaco Taiji, kie la imperiestro traktis gravajn ŝtatajn aferojn. Nordoriente ekster la urbo estis la palaco Daming kun la ĉefa halo Hanyuan situanta sur alta loko, simetriaĵaj altaj pavilonoj kaj zigzagaj koridoroj, kie la imperiestro donis festenon al la senditoj el aziaj landoj kaj aranĝis solenan aŭdiencon por eksterlandaj senditoj.

En la sudorienta parto de la urbo estis fama lotus-ĝardeno kun akvejo ĉirkaŭita de domoj kaj pavilonoj. La imperiestro kun siaj edzino kaj kromedzinoj ofte tie donis festenon al siaj subuloj.

Norde de la urbo estis imperiestra ĉasejo, kie brediĝis multaj raraj birdoj kaj bestoj, kiaj leonoj, ĉamoj, dresitaj elefantoj el la Suda Azio, danc-ĉevaloj el la Okcidenta Azio, parol-povaj birdoj el Hindio kaj blankaj papagoj el Kamboĝo.

En Tang-dinastio, ĉu imperiestro ĉu ordinaraĵaj virinoj, ĉiuj ŝatis poloon. En la ĉasejo estis poloa ludejo speciala por imperiestro. Arkeologoj elterigis arĝilajn figurojn de virinoj en ludo de poloo. En la freskoj de la tombo de kron-princo Zhanghuai malkovrita en Xi'an videblas bildo pri polo-ludo.

La imperiestro Xuanzong de Tang-dinastio estis muzikamanto kaj amuziĝemulo. Li stariĝis muzikan lernejon en sia palaco, elektis muzikistojn kaj persone trejni ilin. Tiam ne estis teatraĵo, sed prosperis diversaj kantodancoj kaj parolrakontado, kiuj sendube influis la postajn teatron kaj parol-kantan literaturon de Ĉinio.

JEN APERIS, POST «RAKONTOJ PRI AFANTI»,  
ALIA SAME INTERESA LIBRETO TAŬGA KIEL  
POSTKURSA LEGAĴO:



# SAGO-SAKO

Ĉinaj Popolaj Rakontoj

Ĝi enhavas 14 mallongajn rakontojn pri Balagenca (Mongolo), Agu Dumba (Tibetano), Hoĝa Nasar (Kazaĥo), Aldil Kusa (Kazaĥo) kaj Buho (Jaŭo). Ĉiuj estas interesaj kaj montras la saĝecon de la herooj.


Esperantigita de Fan Yizu  
Polurita de Geoffrey Sutton  
Ilustrita de Tian Yuan kaj Jin Ming

Eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo  
Numero: 10-Es-1778P

Formato: 11×18cm. 78pĝ.

Prezo: £0,50 US\$0,95

Mendu ĉe: Libroservo de UEA  
Perantoj de EPC



aŭ: Esperanta Seĝcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN),  
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## De Jiamusi al Tongjiang

de LI PING

**M**I daŭrigis mian vojaĝon de Harbin al Jiamusi per pasaĝerŝipo. Inter tiuj du urboj troviĝas 445-kilometra navigvojo, la ĉefa parto de Songhua-rivero. Antaŭ pli ol mil jaroj la prapatroj de manĉuroj jam ŝipveturis suden laŭ la rivero. La naviga afero de la rivero komenciĝis en la jaro 1907. Nun la jara transporta kapacito de la du havenurboj superas milionon da tunoj.

En tiu parto la rivero kuras rapide kaj en ĝin enfluas multaj branĉoj. Poste la rivero kuras inter la montaroj Malgranda Xing'an kaj Zhangguangcai. Tie ĉe ambaŭ bordoj staras vertikalaj krutaĵoj, kaj kelkie videblas eĉ rifoĵoj en la rivermezo. Tie

estas fama "Yilan-malprofundajo", 27 kilometrojn longa, 1.5 kilometrojn larĝa kaj 1 metron profunda, oni nomas ĝin "Alta Sojlo".

Vespere mi staris sur la malantaŭa ferdeko kaj rigardis foren. Ondoĵoj levitaj de la helico ruĝiĝas de krepusko. Post nelonge falis nokta kurteno kaj eklumis la lampoj sur la ŝipo.


Mi revenis en la kajuton. Monotona vojaĝo facile faras nekonatojn bonaj amikoj. Mia kunulo, nealta mezaĝulo, gaja kaj senĝena, estis drinkema, kaj insistis invitis min drinki kune kun li.

Li estas forstuma inĝeniero en la Malgranda Xing'an-montaro.


Li ĵus revenis de Pekino post oficvojaĝo. Li diris, ke li tre amas Pekinon kaj ankaŭ sian profesion. Ŝajne ekzistas kontraŭdiro inter la laboro en montaro kaj la sopiro al urba vivo.

Pri sia laboro li babiladis ĝoje kaj multe. Li diris al mi, ke la montaroj Malgranda Xing'an norde kaj Zhangguangcai sude de la rivero estas famaj bazoj de ligno de nia lando. Sur tiuj du montaroj kreskas arboj de pli ol 120 specoj. La Malgranda Xing'an-montaro estas fama kiel "hejmlando de koreaj pinoj", kiuj altas je 40 metroj. Ilia ligno estas malpeza, mola, delikata, facile prilaborebla, korodimuna, tial bonkvalita materialo por konstruaĵoj, pontoj, ŝipoj

*Nova urbeto Jiansanjiang*







*Tombo de Verda Majo kaj Liu Ren*

kaj mebloj. Tie estas ne nur maro da arbaroj, sed ankaŭ besta regno, kie vivas raraj nord-orientaj tigroj, makulaj cervoj kaj blankaj cikonioj, protektataj de la ŝtato. Tie kreskas mult-specaj nektaraj plantoj, kiuj allogas abelbredistojn de aliaj provincoj. Li diris al mi precipe, ke la gusto de muskato farita el la tieaj montaj vinberoj estas tre agrabla.

La nokto profundigis. Estis adiaŭa tempo por li. Firme premante mian manon, li invitis min gastigi ĉe li, en lia forstuma regiono.

En la sekva tagmezo mi atingis la urbon Jiamusi. Sur la ŝipo mi vidis, ke ŝtonaj digoĵoj staras ambaŭborde de la rivero kaj konturiĝas altaj konstruaĵoj; tre okulfrapa estas Kontraŭinunda Monumento.

Jiamusi, kiu ekhavis sian unuan straton en 1888, aĝas nur

95 jarojn. En la malnova Ĉinio ĝi estis nur grenfoirejo kun malpli ol dekmil loĝantoj ĝis 1925. Nun ĝi estas industria urbo kun kelkcent mil loĝantoj.

Estas menciinde, ke tie forpasis la fama internaciisma batalantino esperantistino Verda Majo kaj ŝia edzo Liu Ren. En novembro de 1946, malgraŭ vinttra frosto ili venis al la ĵus liberigita Jiamusi post longa vojaĝo por komenci sian laboron. Estis malfeliĉe, ke operaciite, Verda Majo suferis de infektiĝo kaj mortis en la deka de januaro 1947. Post nur cent tagoj ankaŭ Liu Ren mortis de malsano. Antaŭ nelonge oni faris inaŭguron por la nove konstruita tombejo de Verda Majo kaj Liu Ren sur la monto Sifeng ĉirkaŭita de akvo en tri flankoj, en la suda antaŭurbo. La ceremonion ĉeestis ankaŭ delegacio estrata de la urbestro de Nilasaki de Yamanaŝi, hejmloko de Verda Majo.

La tombejo kaŝiĝas en arbaro. Sur la marmora V-forma tomboŝtono estas gravurita epigrafo "Tombo de la Internaciisma Batalantino Verda Majo kaj Kamarado Liu Ren" skribita de Chen Lei, la estro de Heilongĵiang-provinco. La tombo staras en la formo de staranta libro malfermita, kaj la epitafono notas ilian batalan vivon.

Mi silente staris antaŭ la tombo, plena de respekto. La blua ĉielo, blanka nubo, verda herbotapiŝo . . . Mi ekmemoris korduŝan versajon de Verda Majo:

*Vidu, kara patrin' mia,  
Ili estas nur du el la sen-  
nombraj,  
Kiuj falis antaŭtempe,  
Por ke maturu ruĝaj pomoj  
eterne-bele  
En la kontinent', en Japani',  
Kaj en la vasta tuta mond'.*

Mi daŭrigis mian veturadon norden laŭ la rivero kaj eniris

en la belan kaj riĉan ebenajon Sanjiang, kiu konsistas el la basenoj de la tri riveroj Heilong, Songhua kaj Wusuli. Tiu ebenaĵo havas areon de ĉ. sepdek mil kvadrataj kilometroj. De antikveco oni nomas tiun senhoman sovaĝejon ĉe la landlimo "Norda Dezerto". La fekunda ebenaĵo riĉas je river-cervoj, fiŝoj kaj fazanoj.

En 1947 ekspluatantoj-pioniroj venis tien kaj komencis kultivi la teron. Post la pli-ol-tridekjara peniga laborado tie jam aperis grandaj ŝtataj meĥanizitaj kultivejoj. Nun la loko jam fariĝis grena bazo de la ŝtato, kiu liveras ĉefe tritikon kaj sojfabon. Tie aperis multaj novaj urbetoj kun kranakva sistemo, radiatoroj, vendejoj, banejoj, amuzejoj kaj aliaj servoj. Survoje mi renkontis sangvinajn gejunulojn, kaj ili fiere nomas sin "homoj de la Norda Dezerto".

La torenta Songhua-rivero kunfluas kun la orienten fluanta Heilong-rivero ĉe la gubernio Tongjiang, poste sin direktas nordorienten kaj fine kuniĝas kun Wusuli-rivero ĉe la gubernio Fuyuan, 135 gradojn de la orienta longitudo.

En tiu loko loĝas heĝeoj, la plej malmultnombraj el la ĉinaj naciecoj.

La heĝeoj estas la unika nacieco en norda Ĉinio, kiu sin okupas ĉefe per fiŝkaptado kaj uzas sledon tiratan de hundoj. En la historio ili estis nomataj "tribanoj en fiŝhaŭt-vestoj" aŭ "tribanoj ĉasantaj per hundoj".


Fiŝkaptado kaj ĉasado daŭris multajn jarcentojn ĉe heĝeoj. Maljunaj heĝeoj rakontis, ke heĝeoj sin eknutris per greno kaj ekportis vestojn el ŝtofo nur antaŭ kelkdek jaroj. Nun ili ankoraŭ tenas la moron regali gas-

tojn per telero da nekuiritaj fiŝstranĉaĵoj spicitaj per salo kaj vinagro.

En la malnova Ĉinio la heĝeoj multe suferis de tiranado kaj ekspluatado de militaristoj, burkrotoj kaj eksterlandaj agrezantoj, kaŭze de kio ili mortis multe. En la komenca periodo de la dudekaj jaroj vivis 2 000-3 000 heĝeoj, sed en la fino de la kvardekaj jaroj restis nur iom pli ol 300. Tiam ilin minacis pereado. Post la Liberiĝo la heĝeoj komencis sian stabilan vivon en la hejmloko kaj nun ilia nombro jam superis 800.

Tiu loko multe produktas sturgojn, karpojn, karasojn, blankfiŝojn kaj precipe salmojn. En longa fiŝkaptado la heĝeoj akiris riĉajn spertojn. Ili bone konas la kutimojn de diversa-

## KONCIZA MAPO DE LA BASENO DE SONGHUA-RIVERO



1. Jiamusi; 2. Tongjiang

specaj fiŝoj, povas distingi diversajn fiŝojn laŭ malsamaj ondetoj levitaj de la fiŝoj kaj kaptas ilin per malsamaj metodoj en malsamaj sezonoj. Aŭtuno estas la plej taŭga sezono por kapti salmojn. Oni fiŝas tage kaj nokte, sur la rivero brilas lampoj de la fiŝkaptistoj kaj kampfajroj ĉe la bordo. Estis tre ĉarma aspekto.

Baldaŭ finiĝos mia vojaĝo. Starante sur la bordo, mi retro-rigardis la flagrantan riveron, kiu kvazaŭ fluus el la ĉielo. Pro tio oni nomas ĝin "Ĉiela Rivero". Tamen ĝi kuras sur la tero kaj alportas feliĉon al homoj.





# De Jiamusi al Tongjiang




Fiŝkaptado de heĝe-oj sur la glacia rivero  
Foto de LIU HONGWEI



Songhua-rivero en Jiamusi

Foto de LIU HONGWEI





Akvoutiliga konstruaĵo ĉe la malsupra Songhua-rivero  
Foto de LIU SHAOQIANG




Televidila fabriko de Jiamusi

Foto de SUN WEI



Riĉa rikolto de tritiko sur Sanjiang-ebenaĵo

Foto de LÜ XIANGQUAN







Jiamusi en nokto

Foto de LIU SHAOQIANG

Enfluejo de Songhua

Foto de LIU HONGWEI





# Antikvaj Restaĵoj en Songshan

Fotoj de CAO BAILONG



«Bonzoj Sin Ekzercas en Lukto», fresko en Shaolin-templo

Fresko en Shaolin-templo





Observatorio establita de ĉina astronomo Guo Shoujing en 1276

Pagodo konstruita en 520 p.K. en la templo Songyue



815N

# LA GRANDA

# MURO — MIRAKLO EN LA MONDO



*Ĉu vi volas  
koni ĝiajn pasintecon  
kaj nunan staton?*

BV. LEGI ARTIKOLOJN EN  
“EPĈ”, 1984.

